<b>Kiel</b> , comme ..... (manière)	<i>Que</i> vous êtes bon ! <i>Kiel bonkora vi estas !</i>
<b>Kiom</b> , combien ..... (quantité)	<i>Que</i> de mouchards à cette réunion ! <i>Kiom da spionpolicistoj ĉe tiu kunveno !</i>
<b>Kiam</b> , quand ..... (temps)	Il partira le jour <i>que</i> j'arriverai. <i>Li foriros en la tago, kiam mi alvenos</i>
<b>Kial</b> , pourquoi ..... (cause)	<i>Que</i> ne le disiez-vous ? <i>Kial vi ne diris tion ?</i>
<b>Pli... ol</b> , plus... <i>que</i> ..... (comparaison)	Plus blanc <i>que</i> la neige. <i>Pli blanka, ol neĝo.</i>
<b>Nur</b> , ne... <i>que</i> , seulement. (restriction)	On ne meurt qu'une fois. <i>Oni mortas nur unufoje.</i>

## Adjectif (ATTRIBUT DE QUALITÉ)

<b>Kia</b> , (tel) quel ..... (corrélatif)	Il est tel <i>que</i> son père. <i>Li estas tia, kia estas lia patro.</i>
<b>Kia</b> , quel ..... (corrélatif sous-entendu)	Si j'étais <i>que</i> vous. <i>Se mi estus, kia vi estas.</i>

## Conjonction

<b>Ke</b> , <i>que</i> ..... (subordination)	Je crois qu'il viendra. <i>Mi kredas, ke li venos.</i>
<b>Ĉu... ĉu</b> , soit..., soit ..... (incertitude)	<i>Que</i> vous vous lamentiez ou <i>que</i> vous vous réjouissiez, la révolution aura lieu. <i>Ĉu vi ĉagrenegos, ĉu vi ĝojos, la revolucio okazos.</i>

## Préposition

<b>Krom</b> , outre, hormis ..... (restriction)	Il n'a pris rien autre chose <i>que</i> de l'eau. <i>Li trinkis nenion alian, krom akvo.</i>
--	---

## Explétif

Aucun sens ..... (ne se traduit pas)	C'est folie <i>que</i> d'aimer <i>Ami estas frenezaĵo</i> (l'amour est une folie)
Aucun sens ..... (ne se traduit pas)	Ce que c'est <i>que</i> de nous. <i>Kio estas ni !</i> (que sommes-nous !)

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduire par écrit, puis oralement, en se servant du lexique.)

**La homa korpo.** — Haŭto, karno, muskolo, medolo, nervo, sango, arterio, vejno ; skeleto : osto, vertebro, artikoj.

**KAPO :** kranio, cerbo, haro, frunto, tempio, okulo, palpebro, okulharo, brovo, orelo, nazo, naztruo, vango, vangharo, buŝo, lipo, lipharo, makzelo, dentokarno, dento, lango, palato, saliva glando, mentono, barbo, gorgo, laringo, ezofago.

**TRUNKO :** torakso, spino, ŝultro, klaviklo, brusto, ripo, sino, pulmo, koro, stomako, hepato, dorso, skapolo, reno, talio, kokso, postvango, ventro, intesto, veziko, organo, seksorganoj.

**MEMBROJ :** brako, humero, kubuto, antaŭbrako, manartiko, mano, manplato, mandorso, fingro, ungo ; kruro, ingveno, femuro, femurosto, genuo, genuosto, tibio, tibikarno, piedartiko, maleolo, kalkano, plando, piedfingro.

## Expressions à ne pas confondre

Ĉasi.....	Chasser (à tir ou à coudre), aller à la chasse.
Peli.....	Chasser, renvoyer, pousser devant soi.
Devi.....	Devoir (obligation morale).
Ŝuldi.....	Avoir une dette pécuniaire, devoir (argent).
Defendi.....	Défendre contre une attaque, défendre un accusé.
Malpermesi.	Défendre quelque chose, interdire.
Deklivo.....	Inclinaison du sol, côte (rampe, pente).
Ripo.....	Côte (anatomie).
Demandi.....	Demander, questionner, interroger.
Postuli.....	Demander, exiger une chose, réclamer.
Peti.....	Demander, prier quelqu'un de (faire quelque chose).
Preĝi.....	Prier (religion).
Difekti.....	Détériorer, endommager, gâter, abîmer.
Fuŝi.....	Gâter, bâcler, saboter.
Artikolo.....	Article (grammaire, statuts, journal).
Artiklo.....	Article (marchandise).
Artiko.....	Article, articulation, jointure (anatomie).

## Naiveco

Knabino sesjara havis katon kaj pupon. Iu demandis ŝin, kiun el la du ŝi preferas. Ŝi ne volis respondi, fine ŝi diris al li en la orelon :

— Mi preferas mian katon, sed ne diru tion, mi petas vin, al mia pupo.

## Kiu li estis ?

Juna homo estis iam en malliberejo, kaj malpermesite estis al iu ajn viziti lin ekster liaj parencoj. Foje maljunulo venis en la malliberejon kaj volis vidi la junan homon.

— Ĉu vi estas parenco de la malliberulo ? demandis la gardisto, oni ne enlasas fremdulojn.

— Jes, respondis la maljuna homo.

— Kiu do vi estas ?

— Aŭskultu, mi diros tion al vi : mi havas nek fratojn, nek fratinojn, sed la patro de la junulo estas filo de mia patro.

## LEGAJO

## JOHAN-PETRO

## II

## POSTMILITA VIVADO

Finiĝis la malhumana dramo. Johan-Petro ĝin travivis de la unua ĝis lasta tago. Plurfoje vundita, li tamen sukcesis eliĝi el la inferaĵo: Kredeble dank'al iu neklarigebla miraklo! Estas vere, ke se la bonkora Silsano eltiriĝis el la milito, li fordonis al ĝi gravan parton el sia sano — tiel fortika antaŭe!

La dum longaj jaroj elportitaj suferoj influis la junulon ne nur korpe sed ankaŭ spirite. Lia karaktero treege ŝanĝiĝis. Antaŭ la milito Johan-Petro estis plivole gaja. Nune li estas tute neridema kaj ŝajnas senĉese enprofundigita en meditado. Kio en li ne ŝanĝiĝis, tio estas lia laboremo. Kun laŭdinda fervoro, li helpas al la gepatroj por la kampaj laboroj, — la bonaj gepatroj, kiuj jam maljunetiĝas!...

Post la labortago tre strange agas Johan-Petro. Preskaŭ ĉiuvespere, kiam la vetero estas nepluva, li surgrimpas monteton, troviĝanta proksime de la gepatra bieno. Tie, ĉe malsupro de dika kverko, la juna viro sidas apogante sian dorson kontraŭ la trunkon de la arbo. Li momenton admire rigardadas la sunkuŝiĝon, kio estas por la junulo spektaklo ĉiam same rava. La ruĝa rondaĵo iom post iom malaperanta ŝajnas altirita de ia mistera forto, ne toleranta minuton eĉ sekundon da prokrasto.... Jen la suno malaperis! La nokto etendas sian grizan vualon, kiu rapide fariĝas preskaŭ nigra. La steloj, kiuj antaŭ momento estis nur kelkaj estas nun laŭ nekalkulebla nombro. Kelkminute la penso de Johan-Petro konfuze vagadas inter tiuj malproksimegaj mondoj kaj... remalsupreniras teren.

Tiam la spirito de la ekssoldato estas ekkaptita de tre stranga ideo: li komparas nian planedon kun tiu multego da apenaŭ videblaj astroj moviĝantaj en neimageblaj vastegaj areoj, kaj juĝas, ke ĝi estas rilate la universon same, kiel sablero rilatas al monto: « Kaj, diras al si Johan-Petro, la homo fanfaronas, ke ĝi estas mirinda estaĵo!... Kompatinde! Kompatinde! » Poste la dummilita vivado kun ĝiaj nepriskribeblaj teruraĵoj montriĝas antaŭ la okuloj de la viro. Ho, abomene! abomene!... For tiu ploriga tempo, kiu montras ĝis kia grado la homa estaĵo estas « nobla ». Plorinde! Plorinde!...

Fine Johan-Petro ĉirkaŭrigardas la kamparon lin nebule ĉirkaŭanta kaj profunde meditas pri la homara vivado. Li pripensas : « La naturo, nia bonkora patrino, donacis al la homo ĉion, por ke ĝi estu feliĉa : kampojn produktivajn, servobestojn, ĉiaspecan materialon, agrablan klimaton ; unuvorte la homoj vivas meze de paradizo, sed malgraŭ tio, ili estas tiel malfeliĉaj, kvazaŭ ili vivus en infero. Strange, tre strange ! » Dum 2-3 horoj Johan-Petro meditas pri kia maniero igi la homojn harmonie kunvivadi. « Kion fari ? Kion fari ? » li senĉese diras al si. Ofte je noktomezo la meditante ankoraŭ sidas sur la monteto. Tiam ekstarante por foriri, Johan-Petro lastan fojon murmuras : « Kion fari ? Kion fari ! »...

Igi la homojn vivi pli feliĉe, tiu penso estis tute kaptinta Johan-Petron. Tage kaj nokte la junulo estis turmentita de ĝi.

Iun tagon, pliĝuste iun nokton, forlasinte la kontraŭkverkan sidejon, Johan-Petro ĝoje revenas hejmen. Kvazaŭa lumradio estas enpenetranta lian kapon heliganta lian spiriton kaj samtempe varmiganta la koron. « He ! He ! li diras al si mem, ĉu tio ne estus se ne perfekta solvo, almenaŭ antaŭpaŝo al solvo kontentiga ? »

Je la unua fojo, de kiam li estas malmobilizita, Johan-Petro ĝuas senmiksan, mildan ĝojon. Io ĝis nun ŝajninta neeblo, subite montriĝis ebla. « Nu ! diras Johan-Petro, se ĝi estas ebla, ĝi realiĝos ! »

Tiun nokton, la filo Delroŝo pasigis ne ferminte la okulojn : dormi estus ja neeble ! Multego da plej strangaj kinematografajoj trapasis antaŭ la spirito de la junulo. Ĉi tiuj bildoj jen malkontentigis, jen entuziasmigis lin. Ne ĉiam agrabla estis la revado ! Ĝis la ellitiĝa momento Johan-Petro baraktis kontraŭ du fantomoj, kiuj nepre volis sin trudi al li : ĝi estis *Kimero* kaj *Realeco*.

Fine Kimero estas venkita kaj Realeco gaje ridetas al la revanto. De tiam celo nepre trafanta montriĝas al Johan-Petro.

Kelktage la ideoj de la juna viro estas malprecizaj. La malordo aŭ konfuzo regas en lia spirito. Kvankam Kimero ŝajnis tute venkita, estas ankoraŭ necese iom batali kontraŭ ĝi. Tamen iom post iom, la ĉefa ideo pli kaj pli senvualiĝas, ĝis ĝi fine fariĝas mirinde klara ; tiel klara, ke Johan-Petro miras pro tio, ke li ne pli frue pensis pri ĝi !

(Daŭrigota.)

## CHAPITRE TROISIÈME

## COMPARATIF ET ACCUSATIF

**Comparatifs secondaires.** — *L'inégalité* peut s'exprimer par des comparatifs secondaires formés à la façon de : **pli... ol**, **malpli... ol**. Ce sont, entre autres :

<b>prefere ol...</b>	<b>plivole ol...</b>	<b>malsama ol...</b>	<b>alia ol...</b>
<i>de préférence à...</i>	<i>plutôt que...</i>	<i>différent de...</i>	<i>autre que...</i>

<b>Lupo prefere ol ĝendarmo</b>	<b>Pardono plivole ol malamo</b>
<i>Un loup de préférence à un gendarme</i>	<i>Le pardon plutôt que la haine</i>

*L'égalité* peut s'exprimer par le comparatif secondaire **same... kiel** (*de même que..., aussi bien que...*), formé comme **tiel... kiel**, l'adverbe *same* renforçant l'équivalence. Ex. :

<b>Mi pensas same, kiel vi</b>	<b>Besto suferas same, kiel homo</b>
<i>Je pense comme vous</i>	<i>L'animal souffre aussi bien que l'homme</i>

**Accusatif après : ol... kiel...** Si le premier terme de la comparaison est à l'accusatif, le second terme après **ol...** ou après **kiel...** se met aussi à l'accusatif, s'il est le complément direct d'un verbe sous-entendu.

Ex. : **Li pli amas sian patron, ol sian fraton**  
*Il aime plus son père que (il n'aime) son frère*

**Mi konsideras lin, kiel fremdulon**  
*Je le considère comme (je considère) un étranger*

Mais si le terme qui suit **ol** ou **kiel** est sujet du verbe sous-entendu, il ne prend pas la marque de l'accusatif, car le sens est tout différent.

Ex. : **Li pli amas sian patron, ol lia frato**  
*Il aime plus son père que son frère (n'aime son père)*

**Mi konsideras lin, kiel fremdulo**  
*Je le considère, comme un étranger (le considérerait)*

La nécessité de l'accusatif après le comparatif apparaît nettement dans la phrase :

**La domaj bestoj pli ŝatas la kulturitajn herbojn, ol la sovaĝaj (n)**  
*Les animaux domestiques aiment plus les herbes cultivées que les sauvages*

Si on met : *sovaĝajn*, il s'agit des herbes sauvages.

Si on met : *sovaĝaj*, il s'agit des animaux sauvages.

**Expressions adverbiales** (comparatif et superlatif).

Les expressions : *en plus, en moins, en trop, au plus, au moins*  
ou leurs équivalentes : *de plus, de moins, de trop, pour le moins*  
se rendent par : **plie malplie troe pleje almenaŭ**

Ex. : **Unu parolado plie malplie** *Dix brochures en trop*  
**Dek broŝuroj troe**

*A cinquante ans au plus, tout travailleur a droit au repos*

**Ĉiu laboristo pleje kvin-dekjara rajtas ripozi**

*L'enfant devrait fréquenter l'école jusqu'à seize ans au moins*

**La infano devus vizitadi la lernejon ĝis la dek-sesa almenaŭ.**



## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduisez chaque mot par écrit, en lisant à haute voix.)

**Domo.** — MATERIALO : ŝtono, kalko, sablo, cemento, gipso, briko, kahelo, tegolo, ardezo, ligno, marmoro, porcelano, vitro, kolorŝmiro, emajlo. ORDINARAJ METALOJ : Fero, ŝtalo, giso, kupro, bronzo, lado, plumbo, zinko, stano, aluminio.

KONSISTO : fundamento, muro, ĉambro, koridoro, enirejo, sojlo, pordo, seruro, ŝlosilo, ŝlosilaro, riglilo, plafono, planko, kahelaro, pargeto, pargetero, fenestro, fenestrovitrilo, vitraĵo, ŝtuparo, balkono, perono, teraso, tegmento, trabo, trabeto; kelo, manĝoĉambro, dormoĉambro, salono, legejo, fumejo, banoĉambro, necesejo, tualetejo, skriboĉambro, kuirejo, mansardo, subtegmento.

MEBLARO : tablo, unupieda tableto, seĝo, brakseĝo (apogseĝo, seĝego), benko, sofo, kanapo, telermeblo; telertableto, skribotablo, komodo, ŝranko, murŝranko, spegulŝranko, libroŝranko; lito: matraco, submatraco, littuko, kapkuseno, kusenego, lankovrilo, piedkovrilo, litotapiŝo, littableto.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Dolori</b> . . . .	Etre douloureux, faire mal (organe atteint, blessé).
<b>Suferi</b> .	Souffrir moralement ou physiquement.
<b>Domo</b> . . . .	Maison, habitation quelconque.
<b>Hejmo</b> .	Demeure familiale (le foyer).
<b>Doni</b> . . . .	Donner (laisser quelque chose à quelqu'un).
<b>Donaci</b> .	Donner (faire un don, un cadeau).
<b>Liveri</b> .	Donner (fournir, livrer — fruits, résultat).
<b>Drinki</b> . . . .	Boire avec excès, s'adonner à la boisson.
<b>Trinki</b> .	Boire (sens général).
<b>Estimi</b> . . .	Estimer, avoir de l'estime pour quelqu'un.
<b>Ami</b> . . .	Aimer une personne, avoir de l'affection pour...
<b>Ŝati</b> . . .	Estimer quelque chose, apprécier, priser, faire cas de.
<b>Taksi</b> .	Estimer, évaluer la valeur de quelque chose.
<b>Felo</b> . . . .	Peau d'une bête avec son poil.
<b>Haŭto</b> .	Peau (homme et animaux)
<b>Ledo</b> . .	Peau corroyée, tannée, cuir.
<b>Pelto</b> .	Fourrure (naturelle). <i>Peltofelo</i> : pelisse.

## La ruzulo

Iu knabo revenas el la lernejo. Ekvidante sian patron li ĝoje krias :

— Paĉjo, hodiaŭ vi ĝojos! Ĉar mi nun ne plu sidas sur la lasta benko.

Respondas la patro :

— Vi estas ja bona filo! Jen, prenu pecon da ĉokolado! Sed diru : Kiel okazis tio?

— Ho, rediras la knabo, la lasta benko nun estas riparata.

## LEGAJO

## JOHAN-PETRO

## III

## ĈU LA SOLVO?

Se la ideo, kiu tiel forte spiritkaptis Johan-Petron, ŝajnis teorie facila por efektiviĝi, ĝi praktike montriĝis treege komplika kaj plena je eble maldolĉaj surprizoj. « En la vivo, diras al si Johan-Petro, nenio — precipe bonfaronta — efektiviĝas senpene. Por realigi bonaĵojn estas necesege batali, longe bataladi kaj ankaŭ suferi. Aliflanke vivi ne luktante kontraŭ rutino, moro, nescio ne estas vivi : mi do estas preta *plene vivi* por starigi mian humanan planon ».

Ĉi tiu firma decido restarigis ekvilibron en la menso de la juna homamulo, kiu de tiam sin tute fordonis al tio, kion li nomis « sia realigenda revo ».

La gepatroj de Johan-Petro jam rimarkis la emon de la filo al soleco kaj meditado ; sed sciante pri lia inklino al studado kaj penslaborado, ili ne tre miris. Tamen, tial, ke ĉi tiu izolemo estis pliiganta, ili sin demandis ĉu vere ĝi ne estas konsekvenco de ia malsano, pri kiu ne parolas la junulo. Ili do demandis lin, kial li ĉiam estas revema : ĉu li okaze suferas ? Ridetante la filo trankviligis ilin nur klarigante, ke se li efektive de kelka tempo estas eble pli forigema ol antaŭe, la kaŭzo kuŝas en tio, ke, pro speciala afero, li devas longe pripensadi. Li cetere esperas baldaŭ ĝin konigi. Ne plu insistante la gebonuloj opiniis, ke la filo kredeble prilaboras novan terkulturan metodon.

Johan-Petro estis jam sufiĉe spertinta la vivon por scii, ke igi la homon ŝanĝi la vivmanieron, la prisocian opinion, la kutiman moron estas io tre malfacila. Ĉar por efektiviĝi la dum longa tempo pripensitan planon estis absolute necese, ke la Silsanoj ŝanĝu pli malpli sian pensmanieron rilate la socian demandon, la junulo decidis agi ne krute, sed nur iom post iom, nerimarkite. La morala potenco, kiun Johan-Petro detenis de sia famo, estos en la nuna cirkonstanco grava helpilo por li : li do kiel eble plej lerte uzos ĝin. Aliflanke estis en la urbeto iu tre riĉa bienulo socialistema tre amike rilatanta kun Johan-Petro. Al li la jam fama terkulturisto klarigis sian ideon. Treege mirigite la riĉulo gratulis kaj promesis monhelpon kiel eble plej gravan....

Dum jaro kaj duono Johan-Petro organizis en Silso 20 gravajn kunvenojn, kiujn ĉeestis la preskaŭ tuta tiea geloĝantaro. Lertaj

paroladistoj venis el la departementa ĉefurbo por iel trakti la temon pri homara solidareco. Plej ofte la paroladoj estis agrabligataj kaj kompletigataj per lumbildoj, kio tre interesis la ĉeestantaron. Intertempe, dank' al instigo de Johan-Petro, la urba konsilantaro estis stariginta kinematografejon el kies filmoj la Silsanoj multe lernis pri jena temo : *kiel estas nuna homaro, kiel ĝi povus esti.*

De tempo al tempo — ĉar estas ankaŭ necese amuziĝi — Johan-Petro organizis koncertan aŭ sportan feston. Neniam ĝis nun estis okazinta en la urbeto io simila! La antaŭa unutona kaj senĉarma vivado estas anstataŭita de tute alia vivmaniero. Antaŭe ĉiu familio pasigis hejme — preskaŭ ĉiam hejme — sian nelaboran tempon kaj rilatis malofte kun aliaj. Nune okazas tute male. Estas vere, ke tiom da cirkonstancoj faciligas la kunmiksadon de la geloĝantoj!

Krom la gravaj paroladkunvenoj celantaj influi la spiriton de la Silsanoj, Johan-Petro starigis diversajn por la praktika vivo. Li ja fondis bibliotekon komforte instalitan kaj enhavanta ĉiafakajn verkojn instruivajn por viroj kaj virinoj, junuloj kaj plenaĝuloj. En la komenco tiu biblioteko ne estis tre vizitata : legi ŝajnis io luksa!... Sed iom post iom, unue la junuloj, poste la junulinoj kaj fine la gepatroj plezure vizitadis la bibliotekon. Por pli ŝatigi la legejon, Johan-Petro abonigis ĝin al kelkaj ĉiutagaj gazetoj el diversaj politikaj partioj; tiel en la biblioteko oni senpage povis legi pri politika demando. Por allogi la junulinojn kaj pli aĝajn virinojn, Johan-Petro abonis modjurnalojn kaj aliajn privirinajn revuojn; tial oni iom post iom kutimis iri la bibliotekon same, kiel oni antaŭe kutimis iri la preĝejon!

Antaŭ nelonge fondita sporta societo liveras al la junularo agrablan okazon pasigi plezure kaj utile kelkajn liberhorojn.

La fanfaro, kiu antaŭe apenaŭ « vivetis » estis revigligata, kaj nune ĝi akurate ĝuigas la loĝantaron per orelplaĉaj koncertoj.

Plie utiligante la rivereton, trapasanta tra la urbeto, Johan-Petro starigis banejon tre ŝatata de ĉiuj Silsanoj. Unuvorte la nunan vivon en Silso oni tute ne povas kompari kun la antaŭa. Ĉiuj klare konscias, ke la ĝuatajn bonaĵojn kaj agrablaĵojn oni ŝuldas al Johan-Petro, kies famo kaj morala potenco ĉiam pli kaj pli graviĝas.

Tiam la lerta terkulturisto juĝas, ke la unua parto de lia el-laborita plano efektiviĝis; ke tiu realiĝo sufiĉe antaŭpreparis tion, kio restas nepre kaj kiel eble plej baldaŭ plenumiĝonta. Mi rapidu! diras li al si iom senpacience...

(Daŭrigota.)

## CHAPITRE QUATRIÈME

## VOIX ACTIVE

## Mode Indicatif

PRÉSENT		PASSÉ INDÉFINI	
Mi amas	J'aime	Mi estas aminta	J'ai aimé
Vi amas	Tu aimes	Vi estas aminta	Tu as aimé
Li, ŝi, ĝi amas	Il, elle aime	Li, ŝi, ĝi estas aminta	Il, elle a aimé
Ni amas	Nous aimons	Ni estas amintaj	Nous avons aimé
Vi amas	Vous aimez	Vi estas amintaj	Vous avez aimé
Ili amas	Ils, elles aiment	Ili estas amintaj	Ils, elles ont aimé
IMPARFAIT		PLUS-QUE-PARFAIT	
Mi amis	J'aimais	Mi estis aminta	J'avais aimé
PASSÉ DÉFINI		PASSÉ ANTÉRIEUR	
Mi amis	J'aimai	Mi estis aminta	J'eus aimé
FUTUR		FUTUR ANTÉRIEUR	
Mi amos	J'aimerai	Mi estos aminta	J'aurai aimé

## Mode Conditionnel

PRÉSENT		PASSÉ	
Mi amus	J'aimerais	Mi estus aminta	J'aurais aimé

## Mode Impératif

PRÉSENT		PASSÉ	
Amu!	Aime!	Estu aminta!	Aie aimé!

## Mode Subjonctif

PRÉSENT		PASSÉ	
Mi amu	Que j'aime	Mi estu aminta	Que j'aie aimé
IMPARFAIT		PLUS-QUE-PARFAIT	
Mi amu	Que j'aimasse	Mi estu aminta	Que j'eusse aimé

## Mode Infinitif

PRÉSENT		PASSÉ	
Esti amanta	Aimer	Esti aminta	Avoir aimé

## Mode Participe

PRÉSENT		PASSÉ	
Amanta	Aimant	Aminta	Ayant aimé
		FUTUR	
Amonta		Devant aimer	

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduisez chaque mot par écrit, en lisant à haute voix.)

**Manĝo.** — LEGOMOJ : brasiko, brasiketo, florbrasiko, karoto, napo, pizo, fazeolo, freŝa fazeoleto, fabo, lento, spinaco, okzalo, poreo, bulbo, terpomo, terpiro, fungo, artiŝoko, asparago, celerio, kukurbo, kukumo, kukumeto, melono, kreso, rafano, skorzonero, tomato.

SPICOJ : pipro, salo, vinagro, mustardo, kariofilo, timiano, spicolaŭro, petroselo, cerefolio, ajlo, askaloniko.

SALATOJ : cikorio, laktuko, skarolo, leontodo, beto.

FRUKTOJ : *kun kerno* : persiko, ĉerizo, pruno, abrikoto ; *kun grajnoj* : frago, frambo, cidonio, piro, pomo, ribo, ruĝa ribo, nigra ribo, groso, mespilo, vinbero, moruso ; *kun nukso* : juglando, migdalo, avelo ; *sudlandaj fruktoj* : oranĝo, daktilo, olivo, granato, citrono, banano, ananaso, figo.

TRINKAĴOJ : akvo, lakto, vino, ĉampano, biero, pomvino (cidro), pirvino, tizano, siropo, sodakvo, likvoro, kafo, teo.

VENENOJ : *alkoholaĵoj* : brando, rumo, konjako, absinto.

## Expressions à ne pas confondre

Flago.....	Pavillon, fanion, bannière.
Standardo ..	Drapeau, étendard.
Flari.....	Sentir avec le nez, flairer.
Odori.....	Sentir, avoir (exhaler) une odeur, être odorant.
Senti.....	Sentir, éprouver une impression physique ou morale.
Flegi.....	Soigner un malade, veiller sur lui (garde-malade, etc.)
Varti.....	Soigner un enfant, veiller sur lui, s'en occuper par état.
Zorgi.....	Prendre soin, veiller soigneusement à...
Flugi.....	Voler (avec des ailes : un oiseau, une machine d'aviation).
Ŝteli.....	Voler, dérober, soustraire.
Rabi.....	Voler, piller avec violence, faire acte de brigandage.
Fraŭlo.....	Garçon, homme non marié, célibataire.
Knabo.....	Petit garçon.
Kelnero....	Garçon de café, de restaurant, de bains, etc.
Freŝa.....	Frais, récent (pain, peinture, etc.)
Malvarmeta.	Frais (température).

## Varma pluvo

Du kamparanoj parolis pri bela vetero, favora por la tritiko, antaŭ nelonge semita de ili :

— Se la varmaj pluvoj daŭros, diris unu, ĉio eliros el la tero.

— Kion vi babilas, diras la alia, mi havas du edzinojn en la tombejo ; mi timas, ke ili revenos al mi.

## Ne grave

Dum edziĝa festeno mallerta servisto elverŝis plenan supujon sur la atlasan veston de sinjorino, kiu tre ĉagreniĝis kaj preskaŭ svenis.

— Ne grave, diris afable la servisto, restas ankoraŭ multe da supo en la kuirejo.

## LEGAJO

## JOHAN-PETRO

## IV

## PLUA REALIĜO

Kunveniginte 6 terposedantojn, kies bienoj apudestas la gepatran, Johan-Petro — kiu antaŭe aprobigis de la gepatroj sian projekton — faris al la kunvenintoj strangan proponon. Detale montrinte la gravan profiton rezultotan el la fakto kunigi la terposedaĵojn de la ĉeestantoj, Johan-Petro firme demandis ilin, ĉu ili konsentas tiun tiel gravan agon : kunigi iliajn bienojn por ilin komune kulturadi? Tiom pli miriga estis la demando, ke ĝi estis tute ne antaŭe pripensita. Tamen ne longe daŭris la miro. Post momento iu diris, ke ĉar Johan-Petro mem konsilas la aferon, ĝi estas sendube farinda; li do konsentas. Alia same jesis, kaj unu post la alia, ĉiuj konsentis.

Dum jaro la tiamaniere kunigitaj bienoj, fariĝintaj bienego, estis tiel lerte administritaj de Johan-Petro, ke la anoncita profito estis jam konstatebla; plie el la plifaciligita kulturado, tiom da labortempo estis ŝparita, ke la terkulturistoj ĝuis pli da libertempo ol antaŭe. Ĉi tiujn konstatojn ĉiuj Silsanoj povis fari, kaj tio varbis al la bienkuniga ideo, unue simpatiojn, poste konvinkitajn anojn. Tiamaniere, ke jaron post la bienkunigo venis subite kaj memvole kvar aliaj terposedantoj por peti sian aliĝon al la entrepreno. Kvankam li ne montris tion, Johan-Petro tre ĝojis pro tiu fakto. Pli poste la aliĝoj okazis tiel are, ke tre baldaŭ tuta komunuma bienaro — ankaŭ kompreneble tiu de la riĉa socialistemulo — estis kunfandita en nur unu vastan bienegon.

Malgraŭ, ke li estas ravita pro tio, ke lia ideo plene kaj tutnature efektiviĝas, Johan-Petro konscias pri la graveco de la situacio. Firme kaj neŝanceliĝe, li devas teni la gvidilon de la ŝipo, sur kiun enŝipiĝis la tuta ĉi tiea geloĝantaro! Li tion plenumos kaj penos eviti ĉian mertigan rifon!

Tuj post la bienkunigo, grava kunvenego okazis, kiun partoprenis ĉiuj Silsanoj. Tie, post klarigoj de Johan-Petro, estis decidate, ke la ĵus starigita bienego apartenas ne nur al la eksposedintoj, sed al ĉiuj loĝantoj en la komunumo, t. e., ke la tuta posedaĵo estas ĉies propraĵo. De nun ĉio en la komunumo estas sen ludvorto vere komuna. Neniu bieno, ĉu kampa ĉu doma, povas esti konsiderata, kiel individue propra. Johan-Petro insiste montras la

gravan oferon faritan de la posedintoj, kiuj celante altan socian idealon memvole, eĉ ĝoje oferdonis sian tutan havaĵon. Sekve estos por ĉiu ĉeestanto nepre devo sindoneme zorgi pri la novfondita komunajo, t. e., ke ĉiu devos labori kun nura celo : kiel eble plej fruktigi la entreprenon. Cetere ju pli fruktodona estos la afero, des pli da bonstato ĝi liveros al ĉiuj. Tio signifas, *ke io komuna celas ĉies profiton*. La dirojn de Johan-Petro aprobis la aŭskultantaro bruege aplaŭdante. Du komitatoj estis balotataj : teknika kaj administra. Johan-Petro estras ambaŭ.

\* \* \*

De kvar jaroj funkcias la Silsa komuna entrepreno. Ĉiu ano tiel sindoneme laboras kaj konscie kondukas, ke neniam ĝis nun estis konstatebla tiel grava ĉiujara profito. Estas vere, ke dank'al neniigo de tute malgrandaj bienoj, la terkulturado estis treege faciligata. Ĉiaspecaj modernaj terkulturiloj estis aĉetataj kaj tiu taŭga ilaro ŝparante homan penadon ebligas pli racian kulturmanieron. La profito rezultanta el tiu farmaniero estas por ĉiuj miriga kaj vere ĝojiga.

La antaŭe ekzistantaj metiejoj, hufforgejoj, veturilfarejoj, domkonstruejoj, riparejoj, k. t. p., estas nune grupigitaj en tre granda loko, kie porferaj kaj porlignaj maŝinoj estas instalitaj kaj elektre movataj. Per duono el la antaŭe necesa laboristnombro, ĉi tiu metiejo liveras dufoje pli da laboro ol liveris la malaperinta agmaniero. En ĉiu fako okazis same : oni centralizis ĉian industrion. El tiu centralizo rezultis nepre laboristoŝparo kaj pliigo da laboro.

En la kolonio spicistoj k. a. komercistoj ne ekzistas plu. Estis starigata koperativo liveranta al ĉiuj ĉion necesa por la vivado — laŭ plej malalta prezo. La ekskomercistoj forlasis Silson aŭ konsentis fariĝi laboristoj. (Se ĉiuj komunumoj imitus Silson, la parazitaj nomataj *komercistoj* estus nepre devigataj labori — same kompreneble pri ĉiuj aliaj parazituloj).

Mastroj kaj patronoj ankaŭ malaperis : estas en la kolonio nur laboristoj, kies rajtoj kaj devoj estas por ĉiuj samaj. Laŭ ebleco estis mallongigata la daŭro de la labortago.

(Daŭrigota.)

## CHAPITRE CINQUIÈME

## VOIX PASSIVE

## Mode Indicatif

## PRÉSENT

Mi estas amata	Je suis aimé
Vi estas amata	Tu es aimé
Li, ŝi, ĝi estas amata	Il (elle) est aimé
Ni estas amataj	Nous sommes aimés
Vi estas amataj	Vous êtes aimés
Ili estas amataj	Ils (elles) sont aimés

## PASSÉ INDÉFINI

Mi estas amita	J'ai été aimé
Vi estas amita	Tu as été aimé
Li, ŝi, ĝi estas amita	Il (elle) a été aimé
Ni estas amitaj	Nous avons été aimés
Vi estas amitaj	Vous avez été aimés
Ili estas amitaj	Ils (elles) ont été aimés

## IMPARFAIT

Mi estis amata J'étais aimé

## PASSÉ DÉFINI

Mi estis amata Je fus aimé

## FUTUR

Mi estos amata Je serai aimé

## PLUS-QUE-PARFAIT

Mi estis amita J'avais été aimé

## PASSÉ ANTÉRIEUR

Mi estis amita J'eus été aimé

## FUTUR ANTÉRIEUR

Mi estos amita J'aurai été aimé

## Mode Conditionnel

## PRÉSENT

Mi estus amata Je serais aimé

## PASSÉ

Mi estus amita J'aurais été aimé

## Mode Impératif

## PRÉSENT

Estu amata Sois aimé

## PASSÉ

Estu amita Aie été aimé

## Mode Subjonctif

## PRÉSENT

Mi estu amata Que je sois aimé

## PASSÉ

Mi estu amita Que j'aie été aimé

## IMPARFAIT

Mi estu amata Que je fusse aimé

## PLUS-QUE-PARFAIT

Mi estu amita Que j'eusse été aimé

## Mode Infinitif

## PRÉSENT

Esti amata Etre aimé

## PASSÉ

Esti amita Avoir été aimé

## Mode Participe

## PRÉSENT

Amata Etant aimé

## PASSÉ

Amita Ayant été aimé

## FUTUR

Amota A aimer, devant être aimé



## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduisez chaque mot par écrit, en lisant à haute voix.)

**Vestaro.** — VIRA VESTARO : pantalono, veŝto, jako, jaketo, jaketo, frako, redingoto, surtuto, pluvurtuto.

VIRINA VESTARO : jupo, subjupo, robo, pantaloneto, korsaĵo, pelto, mantelo. *Turmentilo* : korseto.

KAPVESTOJ : ĉapelo (felta, pajla, melonforma aŭ cilindra), ĉapo, kufo, kepo, bireto.

PIEDVESTOJ : ŝuo, ŝuaĉo, lanŝuo, ŝnursuo, pantoflo, sandalo, butonŝuo, gamaŝo, boto, boteto.

TOLAĴOJ : ĉemizo, kalsono, flanela subveŝto, ŝtrumpo, ŝtrumpeto, ŝelko, ŝtrumpoŝelketo, ŝtrumpligilo, kolumo, kravato, skarpo, vualo, vualeto, manumo, kitelo, bluzo, ganto, duonganto, mufo.

## Expressions à ne pas confondre

Fronto .....	Front d'une troupe.
Frunto.....	Front (du visage).
Frontono.....	Fronton (meuble, édifice).
Frosta ( <i>Vintro</i> ).	Dur (hiver), rude, glacial.
Malmola.....	Dur, résistant (inverse de mou).
Maldolĉa.....	Dur, âpre, amer (inverse de doux).
Malglata.....	Dur, rugueux (inverse de lisse).
Ĝusta.....	Juste, exact, non erroné.
Justa.....	Juste, équitable, conforme à l'équité.
Ekzakta .....	Juste, exact (calcul).
Akurata .....	Juste à l'heure, exact, ponctuel.
Hejti .....	Faire du feu, chauffer (pour chauffer un appartement — poêle, cheminée).
Varmigi.....	Faire chauffer un objet, le rendre chaud.
Bruligi .....	Faire brûler quelque chose.
Homo.....	L'homme (espèce humaine, pas de féminin usité).
Viro.....	Homme (par opposition à la femme, <i>Virino</i> ). Doué de qualités viriles, le sexe fort, le mâle de l'espèce humaine.

## Malfacila problemo

Iu viro havas kun si ursön, kapron kaj florkronon. Li venas al rivero, ĉe kies bordo boato estas alligita. Li volas nun transporti la kapron kaj la kronon trans la akvon; sed la boato estas tiel malgranda, ke en ĝi estas loko nur (krom la viro) por unu el liaj kunuloj! kiel li aranĝos la transporton, se li volas atingi, ke la urso ne estu sola kun la kaprino (*kial do!*) nek la kaprino sola kun la floroj?

*Respondo.* — 1. La viro kaj la kaprino transveturas. — 2. La viro revenas sola. — 3. La viro kaj la urso transveturas. — 4. La viro kaj la kaprino revenas. — 5. La viro kaj la florkrono transveturas. — 6. La viro revenas sola. — 7. La viro kaj la kaprino transveturas.

## LEGAJO

## JOHAN-PETRO

## V

## MATERIALAJ KAJ MORALAJ REZULTOJ

En la momento, kiam okazis la Silsa bienkunigo, la kompatindaj terkulturistoj estis devigataj penige laboradi 12-13 horojn ĉiutage. La unuan jaron oni ankoraŭ laboris laŭ la kutima maniero. La duan jaron, la maksimuma labortempo daŭris 10 horojn, sed jaron poste, t. e. en la 3-a jaro, la daŭro de la labortago estis por ĉiuj je 9 horoj maksimume. De tiam — pro komprenebla singardemo — la labortago ne estis plu mallongigata. Tamen la Silsanoj laboras malpli ol la eksteruloj, kiuj *oficiale* ĝuas la 8 horan labortagon, sed kiuj fakte laboras ĝenerale 10 horojn!... Plie la gekolonianoj rajtas ĝui dusemajnan libertempon ĉiujare: tiun altvaloran novaĵon ili tre ŝatas. Oni jam priparolas plilongigi la libertempon ĝis 3 semajnoj kaj starigi la 8 horan labortagon; tio certe baldaŭ efektiviĝos.

Laŭ tio, kio jam realiĝis en Silso, oni klare konscias, ke se la tuta lando estus komunigita, t. e. se ĉiuj bonfartuloj estus devigataj labori *nur utile, kiel okazas en la kolonio*, ĉiu laborus ne pli ol 4 horojn ĉiutage. Tial la ekzemplo nun montrata de la Silsanoj instruas al la tutlanda premegata kaj ŝtelata gelaboristaro, kaj plej efike stimulas ĝin por ĝia liberiĝo.

Rilate la materialan vidpunkton, la rezulto de la komuna entrepreno estas do nekontesteble kontentiga. Ĉu pri la morala flanko estas same? Oni juĝos el la jeno:

Krom la supre cititaj teknika kaj administra komitatoj estis pli poste fondita klubo nomata « moralperfektigilo ». Ĝiaj geanoj konsistas el 10 viroj kaj virinoj balotitaj de la tuta geloĝantaro — kiel ambaŭ aliaj komitatoj. (Estas necese diri, ke neniu baloto okazas sekrete, sed kontraŭe tute malkaŝe — ĉiu dek okjara loĝant(in)o rajtas partopreni baloton).

La klubo unue zorgis plibonigi la de Johan-Petro fonditaj organizaĵojn, sed ĝi baldaŭ konstatis pri urĝeco krei aliajn. Ekzemple grava kaj bedaŭrinda okazintaĵo gvidis la geklubanojn al iu altmorala institucio.

Iun tagon du viroj kune laborantaj sin subite intercikanis. Ĝis tia grado atingis la malpaco, ke per siaj iloj la viroj sin kruele vundis unu la alian. Iu el ili estis preskaŭ mortonta kaj la alia tre grave vundita. Tamen post iom longa kuracado ambaŭ viroj resaniĝis, sed iu restis blinda.

Ju pli harmonie vivas familio, des pli ĉagreniga fariĝas dramo okazanta inter ĝiaj anoj; tial la ĵus okazinta teruraĵo tre forte skuis la Silsan kolonion. Celante nebligti tiajn abomenaĵojn, la klubo, longe diskutinte pri la afero, decidis proponi al la loĝantaro la kreon de tribunalo, kies konsisto estos tiel simpla, kiel racia. Jen la propono:

Kiam inter du aŭ pluraj kolonianoj okazos malkonsento, ĉiu el la

malpacantoj elektos du el siaj kamaradoj. Ĉi tiuj kunvenos kaj aŭdinte ĉies plendojn juĝos pri la afero. Tiel logika ŝajnis la propono, ke ĝi estis aklame aprobata. Cetere la ideo pli poste montriĝis tre praktika. Efektive la malkonsentoj de tempo al tempo okazantaj estis plej kontentige solvitaj de la juĝantoj, kiuj ĝenerale estas kamaradoj plej simpatiantaj kun la plendantoj. Tia tribunalo tre diferencas el la tiel nomataj registaraj juĝejoj, kies ĉefa « argumento » estas mono kaj « moraligilo »... malliberejo!

Oni ne povas diri, ke en la tempo de la bienkunigo, alkoholismo regis en Silso, sed oni ankaŭ ne povas diri, ke ĝi ne ekzistis. Tial de la komenco, la moralperfektiga klubo ĉiel penadis por kiel eble plej trafe mortatingi la monstron. Specialaj paroladoj estis organizataj, dum kiuj estis montrata la terura efiko de alkoholo. Per lumbildoj, afiŝoj, statistikoj kaj aliaj argumentoj estis kaj estas senĉese memorigate al la loĝantaro pri la moralaj kaj korpaj difektaĵoj kaŭzitaj de la malbenita fluidaĵo. Ĉar la vino estas la tiea kutima trinkaĵo, oni fabrikis senalkoholan vinon. Komence ĝi estis nemulte trinkata, sed ĝi nune estas pli trinkata ol la alkohola. Tiu nura fakto montras jam gravan progreson! Oni ne plu vidas homon ebriansur la strato de Silso. Io miriga estas, ke la virinoj ĝenerale montriĝis plej fervoraj por propagandi kontraŭalkoholismon — estas vere, ke ĝis nun virinoj tiom suferis, tiom elportis el alkoholismo!... La rezulto jam atingita estas tiom pli grava kaj valora por la kolonio, ke plejparte el la antaŭe okazantaj malpacoj estis kaŭzitaj de alkoholdrinkado.

Pri la tre grave interesa seksa demando, la klubo tre batalis kontraŭ la antaŭjuĝoj — precipe je la virina flanko. Kuracistoj specialigitaj en la fako montris la malbonaĵon kaŭzita de la ĝenerala ignoro pri tiu demando. La geparoladistoj (ĉar ankaŭ virinoj traktis la temon) pruvis la neceson naski infanojn nur tiam, kiam oni estas bonsana. Cetere la vivo de multinfana virino estas vera kalvaria vojo; oni devas senlace instrui al la virinoj, ke ili plej facile povas esti patrinoj nur tiam, kiam ili ĝin deziras. La gejunuloj estas plene kaj senrezerve informitaj pri la interseksaj rilatoj kaj iliaj rezultoj — ĉu bonaj ĉu malbonaj. Nune, t. e. pro senvualigo de ĉies okuloj, oni dankas al la klubo, ke ĝi tiel obstine kaj bonfare agadis.

Rilate religion, la klubo ne havis multe por fari por konvinki la kolonianaron pri malinda senhonteco de tiu mistika asocio nomata eklezio. Jam de longe en Silso la kontraŭreligia propagando instruis la tieulojn pri la *beleco de la sanktaj misteroj*. Tial la pastro, kiu apenaŭ povis vivi antaŭ la kolonistarigo, estis fine devigata foriri pro malsato, — li kompreneble ne konsentis fariĝi laboristo!

(Daŭrigota.)

## CHAPITRE SIXIÈME

## IDIOTISMES : FAIRE

Avant de traduire une phrase, réfléchissez à sa signification. Exprimez les idées qu'elle contient par les mots qui conviennent. Il n'est pas de mot en français, qui se prête à autant d'idiotismes que le verbe **faire** :

Zamenhof <i>a fait</i> l'Esperanto (créer)	<i>Zamenhof kreis Esperanton</i>
Minette <i>a fait</i> ses petits (engendrer)	<i>La katino naskis idojn</i>
<i>Faire</i> un plan (œuvrer)	<i>Verki planon</i>
<i>Faire</i> un monument (construire)	<i>Konstrui monumenton</i>
<i>Faire</i> honte à quelqu'un (rendre)	<i>Hontigi iun</i>
<i>Faire</i> le mort (contrefaire)	<i>Ŝajnigi sin mortinta</i>
<i>Faire</i> la chambre (mettre en ordre)	<i>Ordigi la ĉambron</i>
<i>Faire</i> ses ongles (nettoyer)	<i>Purigi siajn ungojn</i>
<i>Faire</i> peur aux flics (effrayer)	<i>Timigi la policistaĉojn</i>
<i>Faire</i> sa barbe (se raser)	<i>Sin razi</i>
<i>Faire</i> son droit (étudier)	<i>Studi leĝosciencon</i>
<i>Faire</i> un bénéfice (acquérir)	<i>Akiri profiton</i>
<i>Faire</i> bien les choses (prodiguer)	<i>Malavari</i>
<i>Faire</i> des adeptes (recruter)	<i>Varbi adeptojn</i>
<i>Il se fait</i> vieux (devenir)	<i>Li maljuniĝas</i>
<i>Il se fait</i> tard (devenir)	<i>Malfruiĝas</i>
<i>Il se fait</i> que... (arriver)	<i>Okazas, ke...</i>
<i>Il se fait</i> espérantiste (devenir)	<i>Li fariĝas esperantisto</i>
2 et 2 font 4 (être)	<i>Du kaj du estas kvar</i>
Quel temps <i>fait-il</i> ? (être)	<i>Kia estas la vetero?</i>
On lui <i>a fait</i> sa montre (voler)	<i>Iu ŝtelis lian poŝhorloĝon</i>
Il ne faut pas me la <i>faire</i> (tromper)	<i>Vi ne sukcesos trompi min</i>
J'ai fort à <i>faire</i> (être occupé)	<i>Mi estas tre okupata</i>
Je n'y puis rien <i>faire</i> (aider)	<i>Mi ne povas helpi</i>
Cela ne <i>fait</i> rien (important)	<i>La afero ne estas grava</i>
C'est une affaire <i>faite</i> (arrangée)	<i>La afero estas aranĝita</i>
C'en est <i>fait</i> de moi! (périr)	<i>Mi nepre pereos</i>
C'est <i>fait</i> ! (fini)	<i>Estas finite!</i>
C'est bien <i>fait</i> ! (mérité)	<i>Estas meritite!</i>
Etre <i>fait</i> pour l'aviation (destiné)	<i>Esti destinita por aviado</i>
N'être ni <i>fait</i> , ni à <i>faire</i> (gâché)	<i>Esti tute fuŝita</i>
Phrase toute <i>faite</i> (banale)	<i>Banalaĵo</i>

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduisez chaque mot par écrit, en lisant à haute voix.)

**Hejma ilaro.** — **KUIRILARO** : kaldrono, kaserolo, plado, telero, telereto, taso, tasego, glaso, metalglaso ; supujo, salujo, piprujo, oleujo, salatujo, kafujo ; kafkruĉo, kafskatolo, tekruĉo, sukerojo ; botelo, karafo, tranĉilo, kafpistoilo, kribrileto, korko, korkotirilo, vakstolo.

**PURIGILARO** : viŝtuko, telertuko, balailo, plumbalailo, broso, balaileto, plafonbroso, ŝitelo, lavŝtono, lavtabulo, bankuvo.

**TUALETO** : pelvo, kruĉo, sapo, parfuma sapo, spongo, kombilo, dentobroso, dentakvo, spegulo.

**HEJTILARO** : forno, kuirforno, akva hejtaparato, hejta tubaro, gasforno, kameno, kamenstableto, blovileto, cindrujo, fajroŝirmilo, fajrostangeto, fajroprenilo, kamentubo, rostilo, kradrostilo. *Brula materialo* : ligno, ŝtupo, karbo, terkarbo, antracito, torfo, koakso, petrolo, gaso.

**LUMIGILARO** : torĉo, alumeto, alumetujo, fajrŝtono (fajrigilo), kandelo (stearinkandelo, sebkandelo, vakskandelo), kandelingo, lampo, meĉo, lampŝirmilo (lumŝirmilo aŭ lumresendilo), vitra cilindro, elektra lumigilo (butono). *Lumiga materialo* : rezino, oleo, petrolo, petrolesenco, gaso, acetileno, elektro.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Kapti</b> .....	Prendre, saisir, attrapper, faire une capture.
<b>Preni</b> .....	Prendre (sens général).
<b>Kaso</b> .....	Caisse d'un caissier, coffre-fort.
<b>Kesto</b> .....	Caisse, malle.
<b>Kisi</b> .....	Embrasser, donner un baiser discret, intime,
<b>Ŝmaci</b> .....	Embrasser, donner un gros baiser sonore.
<b>Ĉirkaŭpreni</b> .	Embrasser, prendre dans ses bras, étreindre.
<b>Komandi</b> .....	Exercer un commandement militaire ou naval.
<b>Ordoni</b> .....	Ordonner, donner un ordre, comme patron, chef.
<b>Mendi</b> .....	Commander quelque chose, faire une commande.
<b>Konduki</b> .....	Diriger, maintenir en direction, conduire.
<b>Kondukti</b> ....	se conduire (bien ou mal).
<b>Kovri</b> .....	Couvrir partiellement, couvrir telle partie du corps, d'un immeuble, etc.
<b>Tapeti</b> .....	Couvrir d'une tenture, d'une tapisserie, tapisser.
<b>Tegi</b> .....	Couvrir en totalité, recouvrir de toute part, envelopper. <i>Tegilo</i> , housse.

## La du malbeluloj

Sinjoro Malbelegulo rigardas tra la fenestro de sia loĝejo. Sur la strato iras sinjoro Senbeleculo.

— Bonan tagon, sinjoro Malbelegulo.

— Bonan tagon, sinjoro Senbeleculo.

— Kial vi difektas la belecon de la strato per elmontro de via abomena vizaĝo? Estus preferinde, se vi reirus en iun angulon de via ĉambro kaj sidigus vian simion ĉe la fenestro.

— Mi jam provis ĝin; sed tiam la preterirantoj tiel salutis al la fenestro : « Bonan tagon, sinjoro Senbeleculo ».

## LEGAJO

## JOHAN-PETRO

## VI

## ĈIAM ANTAŬEN!

Fakto koniginda estas tiu koncerne edziĝon. Ĝis antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, ĉiuj Silsanoj senescepte edziĝis antaŭ la komunumestro kaj antaŭ la pastro. De tiu tempo okazis edziĝoj «nebenitaj» de la pastro, t. e., ke ili plenumiĝis nur antaŭ la komunumestro; tiuj edziĝoj estis tamen «oficialaj». Nune neniuj edziĝoj estas oficialigitaj de la ŝtata oficisto; la gesilsanoj edziĝas sen atestantoj! Kia stranga revolucio! Tiun novan vojon montris Johan-Petro mem. Jam de iom da tempo la junulo sentis sin korkaptita de iu najbara kamaradino, kiu siaflanke ne estis indiferenta je li: ili kuraĝis diri tion al si reciproke!... Iun someran tagon promenante tra arbareto por ĝui la agrablan malvarmeton de la subfoliara atmosfero, ili sidiĝis sub multbranĉa arbego kaj... ho jes!... kiel bonfara estis la ombro de la arbego, kiel milde bonfara!... Ili do estis geedzoj kaj malkaŝe ĝin diris. Eksciante pri tio, la Silsanoj iom bedaŭrmiris, ĉar tia kondutmaniero ofenditis la ĝisnunan kutimon. Tamen alia paro imitis la ekzemplon, kaj tria, tiamaniere, ke nune en Silso, ĉiuj edziĝas sen la senvalora oficiala aprobo.

Multe oni agas en la porpaca kampo. Estas sciata, ke unu el la precipaj militkaŭzoj estas la multlingveco. Por ĝin kontraŭbatali plejefike, la klubo organizis internacian fakon, kie oni ne nur lernas la tutmondan lingvon, sed kie estas starigita internacia korespondejo. Tie oni ricevas informojn el ĉiuj landoj. Neniu esperanto-oficejo estas tiel lerte organizita, kiel estas tiu en Silso. Ĉiusemajne dum speciala kunveno la loĝantaro estas informata pri la laste ricevitaj sciigoj. Pro la diverseco kaj ofte graveco de tiuj informoj, la kolonianoj tre ŝatas la kunvenon; ĝi fariĝas pli kaj pli interesa. Kiam la plej gravaj laboristaj organizaĵoj de la lando bezonas informojn pri tiu aŭ alia loko de la terglobo, ili nepre sin turnas al la kolonio, kies afabla bonvolo egalvaloras la precizecon de ĝiaj tre ŝatataj sciigoj.

Pere de la esperanto-oficejo estas starigita fako por faciligi interŝanĝon de infanoj dum la ĉiujara libertempo. Ĉar la kolonio havas nune gravajn monrimedojn, ĝi ĉiujare interŝanĝas proksimume 80 geinfanojn kun sama nombro da infanoj el eksterlande: por faligi la fantomajn landlimojn nenio pli taŭgas ol tio.

Ne estas fako en kiu ne agas la klubo. Higieno multe ŝuldas al ĝi. Ankaŭ feminismo. Se fakte feminismo ne povas ekzisti en Silso pro tio, ke viroj kaj virinoj estas samrajtaj, la klubo tamen kiel eble plej penas por helpi al la eksteraj feminismaj grupoj.

Kvankam de nelonge fonditan, oni jam de ĉiuflanke atentis la Silsan kolonion, sed ne pro samaj motivoj! En tiu sukcesinta entrepreno, la ekstera laboristaro antaŭvidas la kernon de la baldaŭ realiĝonta socio anstataŭonta kriman kapitalismon.

Jam frukte ĉiufanken disradias la komunisma organizaĵo. La kolonio estas ja multvizitata de ĉiagildaj delegitoj ĉi tien venantaj

por senpera informiĝo. Kiam ĉi tiu delegitaro rakontas pri tio okazanta en Silso, senbrida entuziasmo eksplodas ĉe la informitoj. Ĉi tiuj pli kaj pli energie demandas, kial oni ne tuj imitas la Silsanojn?...

Aliparte tute malsimpatie la registaro turnas sian atenton al la komunista kolonio, kies evoluo estas por la burĝaro tre maltrankviliga. Oni jam en la reganta medio konsideris, ĉu ne estas eble faligi, detrui tiun tiel danĝeran fondaĵon? Kelkfoje Johan-Petro estis petata de juĝisto por klarigi pri la fondo kaj celo de la entrepreno. Fojon li eĉ estis malliberigita. Sed pro subita kaj ĝenerala protestado de la tutlanda laboristaro, la energia viro estis post kelkaj tagoj liberigita. Vere la registroj ne estas lertuloj. Ili ja ne konscias pri tio, ke ju pli ili perfortos la laboristaron des pli obligos ĝia ribelemo. . . . .

Graya internacia proletariara kongreso estas okazonta. Ĝin partoprenos delegitoj el pli ol 40 landoj. De kiam finiĝis la milito ne estis organizata tiel gravega proletariara manifestacio. El plej malproksimaj anguloj de la terglobo alvenos reprezentantoj de la ankoraŭ sklava sed esperplena homklaso. Por la unua fojo, la diskutado okazos nur per la internacia lingvo, kiun ĉiuj delegitoj ellernis kaj facile praktikas. Inter ili malaperis la lingva baro, kiu estis la nura malhelpaĵo por firma popolunuiĝo. De nun ne plu estas necesaj la tradukistoj. Senpere la popolanoj povas interŝanĝi sian penson, kaj el tio, rezultos, ke la kongresdecidoj estos pli potence realigaj ol la antaŭaj: perfekta interkompreniĝo ja ebligos pli tuje kaj pli plene la efektivigon de la decidoj.

Pro la streĉeco de la tutmonda ekonomia situacio, la diskutado estos gravega. Oni antaŭvidas, ke dum semajno la proceso de la sang- kaj ŝvitavida burĝa socio disvolviĝos antaŭ necedigeblaj juĝontoj. Pretaj senkompate kondamni la malindan kulpulon estas la juĝontoj! La tuta mondo turnas sian atenton al ĝi: la laboristaro kun espero, ke ĝi decidus finan kaj plenan liberiĝon; la tremantaj burĝoj kun timo, ke baldaŭ alvenos la horo de la ŝuldopago.

Johan-Petro partoprenos la kongreson, kiel delegito de la Silsa kolonio. Li foriris el la urbeto ĝuste en la momento, kiam oni tie ekpreparis gravan feston pro datreveno de la kolonifondo. La ĉefa fondinto ne ĉeestos la ceremonion. La festantoj certe ne forgesos, ke en tiu sama horo la sindona kamarado partoprenos la preparadon de alia ankoraŭ pli grava kaj de ĉiuj dezirata festo, t. e. starigo de socialisma socio.

Al la tutmonda kongresanaro, Johan-Petro klarigos, kiel facile estas faligi kapitalismon, kies potenco konsistas precipe el la malfido de la mizeraj laboristoj unuj kontraŭ la aliaj. Tuj kiam la proletarioj plenfidos sin reciproke, tiam subite finiĝos la sanga, la plora dramo kaj... la suno ekbrilos.

*Fino.*

## CHAPITRE SEPTIÈME

TEMPS COMPOSÉS DU VERBE **ESTI**

En Esperanto, le seul *auxiliaire* étant **esti**, aux temps composés ce verbe se conjugue avec lui-même. Toutefois, ces formes composées sont d'un emploi rare : presque toujours la forme simple suffit.

## Mode Indicatif

PASSÉ INDÉFINI		PLUS-QUE-PARFAIT
Mi estas estinta	J'ai été	Mi estis estinta J'avais été
Vi estas estinta	Tu as été	PASSÉ ANTÉRIEUR
Li, ŝi, ĝi estas estinta	Il (elle) a été	Mi estis estinta J'eus été
Ni estas estintaj	Nous avons été	FUTUR ANTÉRIEUR
Vi estas estintaj	Vous avez été	Mi estos estinta J'aurai été
Ili estas estintaj	Ils (elles) ont été	

## Mode Conditionnel

PASSÉ		Mode Impératif	PASSÉ
Mi estus estinta	J'aurais été	Estu estinta	Aie été

## Mode Subjonctif

PASSÉ		PLUS-QUE-PARFAIT
Mi estu estinta	Que j'aie été	Mi estu estinta Que j'eusse été

## Mode Infinitif

PASSÉ
Esti estinta Avoir été

## Mode Participe

PRÉSENT	PASSÉ	FUTUR
Estanta Etant	Estinta Ayant été	Estonta Devant être

## PRÉPOSITION APRÈS PASSIF

En français, le complément du passif se forme par les mots *de* et *par*.

- Ex. : Ce vase est fait *de* la plus fine porcelaine.  
 Votre maison est couverte *de* feuilles.  
 Les bolcheviks ne sont pas aimés *des* bourgeois.  
 Le prêtre est démasqué *par* la science.

En Esperanto ce complément se marque par :

- el s'il s'agit de la matière ;  
 per » du moyen, de la manière ;  
 de » de l'agent actif.

- Ex. : *Tiu vazo estas farita el plej delikata porcelano.*  
*Via domo estas kovrita per folioj.*  
*La bolŝevikoj ne estas amataj de la burĝoj.*  
*La pastro estas senmaskigita de la scienco.*



## EXERCICES

## VOCABULAIRE

(Traduisez chaque mot par écrit, en lisant à haute voix.)

**Veturiloj.** — SURTERAJ VETURILOJ: *Senmotoraj veturiloj*: puŝveturileto, portlito, glitveturilo, dusida kaleŝo, fiakro, infanveturilo, omnibuso, ŝarĝveturilo, ĉaro, barelĉaro, biciklo. *Motorveturiloj*: vagonaro, lokomotivo, tendro, vagono, aŭtomobilo, motorbiciklo, tramveturilo, aŭtobuso.

SURAKVAJ VETURILOJ: barko, boato, ŝipo, velŝipo, vaporŝipo, gondolo, pramo, flosa, kurierŝipo, transatlantika ŝipo, kirassipo, krozŝipo, torpedŝipo, submara ŝipo.

TRAAERAJ VETURILOJ: aerostato, balono. *Flugmaŝinoj*: direktebla balono, aerŝipo, aeroplano, monoplane, biplane.

VETURIGISTOJ: kondukisto, fiakristo, motoristo, tramdirektisto, direktilisto, piloto, marveturanto, aerveturanto.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Kreski</b> .....	Pousser, croître. <i>Kreskaĵo</i> , plante, végétal.
<b>Puŝi</b> .....	Pousser pour faire avancer (véhicule).
<b>Ŝovi</b> .....	Pousser quelque chose en faisant glisser (rideau).
<b>Kuŝi</b> .....	Gésir, être étendu, couché, reposer à plat (très général, se dit de tout ce qui repose sur sa base la plus large).
<b>Stari</b> .....	Se dresser, être debout, dans la position verticale (très général, se dit de tout ce dont la hauteur excède la base).
<b>Kvieta</b> .....	Tranquille, calme, paisible (état physique des êtres et des choses).
<b>Trankvila</b> .	Tranquille, calme, sans inquiétude, sans trouble (au moral).
<b>Lango</b> .....	Langue (organe).
<b>Lingvo</b> ....	Langue, idiome parlé ou écrit.
<b>Laŭdi</b> .....	Louer, louer, donner des louanges, des éloges.
<b>Lui</b> .....	Louer, prendre à loyer, à bail. <i>Luanto</i> , locataire.
<b>Luigi</b> .....	Louer, donner en location, à bail. <i>Luiganto</i> , propriétaire, loueur.
<b>Letero</b> .....	Lettre épistolaire, correspondance. [primerie.
<b>Litero</b> ....	Lettre, caractère d'écriture. <i>Preslitero</i> , caractère d'im-
<b>Majstro</b> .....	Maître dans son art, sa science, sa profession.
<b>Mastro</b> ....	Maître, patron, maître de maison.

## Emocia sporto

Du junuloj disputas unu la alian. Jen diras unu :

— Vi ŝakludas kaj pro tio kredas vin sportisto? Ho, ŝakludo tute ne estas sporto. Sporto devas emocii, eksciti la tutan nervaron!

— Jes, respondas la alia, eble vi estas prava; kaj certe vi ĉasas tigrojn per lanco kaj ponardo aŭ naĝante vi mortigas ŝarkojn?

— Ne; sed mi fiŝhokas.

— Vi nur fiŝhokas?

— Jes, sed sen polica permeso! kaj vi ne povas imagi, kiom tio streĉas kaj ekscitas la nervojn!

**PRAKTIKA FRAZARO (1)**

(PHRASES USUELLES)

**PRI ESPERANTO**

A, esperantisto ; B, skeptikulo.

A. — Bonan tagon, amiko, jam de longe mi ne vidis vin.

B. — Bonan tagon, mi tre ĝojas renkonti vin. Sed kion signifas tiu ĉi verda stelo ĉe via butontruo ?

A. — Ĝi estas la insigno de la esperantistoj.

B. — De la esperantistoj !... Ĉu vi, kara amiko, estas partiano de tiu absurda afero, kiun oni nomas lingvo internacia ?

A. — Jes. Ĉu tio mirigas vin ?

B. — Kompreneble. Mi ja konas vin, kiel saĝan, inteligentan homon.

A. — Ĉu vi do kredas, ke nur sensaĝuloj povas interesiĝi pri lingvo internacia ?

B. — Ho, tion mi ne diris, sed mi opinias, ke ĝi estas belega utopio.

A. — Kial do utopio ?

B. — Estas klare ! Jen. Kiu civilizita popolo iam konsentos forlasi sian gepatran lingvon kaj uzi anstataŭe ian artefaritan lingvon ?

A. — Neniu...

B. — Jen do, vi mem konfesas tion. Mia unua argumento detruis vian tutan hipotezon.

A. — Tute ne. Atendu, ke mi finu, mia kara. Neniu popolo forlasos sian lingvon, ĉar Esperanto estas nur akcesora lingvo, uzota nur kun alilanduloj, kiuj ne scias nian lingvon.

B. (ironie). — Tre ĝentilaj estas la esperantistoj, ke ili permesas al la naciaj lingvoj vivi. Sed ŝajnas al mi pli bone, se ĉiuj popoloj lernus nian francan lingvon jam parolatan de milionoj kaj milionoj da homoj.

A. — Jes, ni Francoj povas tion deziri ; sed Angloj, Germanoj, Rusoj, k. t. p., opinias, ke ilia gepatra lingvo havas la saman rajton. Kiu decidus ? Kiu elektos ?

B. — Efektive, ne estus tre facile kontentigi ĉiujn.

A. — Krom tio, ĉu vi konas multe da alilanduloj, kiuj tute korekte kaj facile parolas francan lingvon ? Nia lingvo estas por ili tre malfacila.

B. — Sed diru, ĉu via Esperanto estas multe pli facila ?

A. — La tuta gramatiko konsistas el 16 mallongaj reguloj, ĉiuj sen esceptoj, kaj ĉiu klera homo komprenas, sen antaŭa lernado, preskaŭ la tutan vortaron.

(1) Plejparto el tiu frazaro estas eltirita el *Praktika frazaro*, de A. Matthias.

B. — Tio ĉi ŝajnas al mi iom stranga. Sed la ĉefa malfacilaĵo devenos de la prononcado: ĉiu popolo elparolos la lingvon alimaniere.

A. — Por homoj el preskaŭ ĉiuj nacioj Esperanto estas pli facile elparolebla, ol iu ajn lingvo.

B. — Kiel ĝi estas ebla?

A. — Tute simple. Esperanto ne uzas sonojn malfacilajn por tiu ĉi aŭ tiu nacio, ekzemple la francajn *an, on, un, u, eu*. Plie, la akcento senescepte troviĝas sur la antaŭlasta silabo de ĉiu vorto.

B. — Mi konfesas, ke tio estas tre lerta ideo, ĉar per tiuj du reguloj, oni forigas la du ĉefajn malfacilaĵojn, kiuj malebligas la ĝustan elparoladon de fremdaj lingvoj. Tamen restos ankoraŭ diferenco en la parolmaniero de Ruso, Japano, Franco aŭ Germano.

A. — Jes, restas malgravaj diferencoj, sed ili absolute ne malhelpas la interkomprenon. Mi certe pli facile komprenas Germanon aŭ Anglon, parolantan esperante, ol mi komprenus lin parolantan france, eĉ post longa restado en nia lando.

B. — Senmoke, mi juĝas, ke ĉio ĉi estas vere interesa kaj mi eble, pro scivolo, aĉetos esperantan lernolibron.

A. — Se vi tion faros kaj atente tralegos la libron, mi vetas, ke vi fariĝos esperantisto.

B. — Kiu scias? Oni ne plu rajtas dubi pri io ajn, de kiam la homo flugas kiel birdo.

A. — Vi estas prava. Plie, se vi estas vera internaciisto, t. e. se vi deziras la fratan alproksimiĝon de la popoloj...

B. (vigle). — Kompreneble, ke mi estas tia, kaj ke mi deziras tion. Ĉu vi iam dubis pri mia internaciisma sento?

A. — Ne, tute ne. Mi nur intencis diri, ke dank'al alpreno kaj praktikado de komuna lingvo, la popoloj faligos la solan baron disiganta ilin, t. e. la lingva baro.

B. — Efektive. Ĝis nun mi ne pensis pri tio. Tiuflanke, via Esperanto havas plej gravan econ.

A. — De la tago, kiam ĉiulandaj proletarioj povos senpere interŝanĝi siajn pensojn, tiam la kapitalistoj ne plu povos igi ilin militi unuj kontraŭ la aliaj!

B. — Tre verŝajne. La demando pri internacia lingvo ŝajnas al mi malpli utopia, ol mi kredis antaŭe. Mi ĝin certe konsideros kaj studos.

A. — Adiaŭ! La proksiman fojon, kiam mi revidos vin, vi ankau portos la verdan stelon!

## CHAPITRE HUITIÈME

## LE MOT COMME

Le mot **comme** est un *adverbe*, qui indique en français toutes sortes de relations : *manière, comparaison, cause, durée, moment.*

En Esperanto, la relation logique est rétablie. *Comme* se traduit par :

<b>Kiel</b> ( <i>manière</i> )	<b>Kiel</b> <i>en songo</i>	<b>Kiel</b> <i>goje!</i>
Ainsi que	<i>Comme</i> en songe	<i>Comme</i> c'est joyeux!
<b>Kvazaŭ</b> ( <i>comparaison</i> )	<i>Li kantas kvazaŭ birdo</i>	
Comme si	Il chante <i>comme</i> un oiseau	
<b>Ĉar</b> ( <i>cause</i> )	<b>Ĉar</b> <i>ĉio estas en ordo, foriru</i>	
Parce que	<i>Comme</i> tout va bien, partez	
<b>Dum</b> ( <i>durée</i> )	<b>Dum</b> <i>ŝi kudris, li ekploris</i>	
Pendant que	<i>Comme</i> elle cousait, il se prit à pleurer	
<b>Kiam</b> ( <i>moment</i> )	<i>Li alvenis, kiam mi estis foriranta</i>	
Lorsque	Il arriva <i>comme</i> je partais	
<i>Explétif</i>	<i>Li anase paŝas</i>	
Ne se traduit pas	Il marche <i>comme</i> un canard (se dandine)	

## LE MOT TOUT

De même le mot **tout** est en français tantôt *substantif* ou *pronom*, tantôt *adjectif* ou *adverbe*. Il entre de plus dans la formation de *locutions adverbiales*. *Tout* se traduit par :

<b>Ĉiu</b> ( <i>adjectif</i> )	<b>Ĉiu</b> <i>homo estas mortonta</i>
Chaque	<i>Tout</i> homme est mortel
<b>Ĉiuj</b> ( <i>adj. et pron.</i> )	<b>Ĉiuj</b> ( <i>homoj</i> ) <i>estas mortontaj</i>
Tous les ( <i>adj.</i> ); tous ceux ( <i>pron.</i> )	Tous les hommes sont mortels
<b>Ĉio</b> ( <i>pronom</i> )	<i>Li forgesas ĉion, kion oni diras al li</i>
Toute chose, tout ce	Il oublie <i>tout</i> ce qu'on lui dit
<b>Tuta</b> ( <i>adjectif</i> )	<i>Restu la tutan tagon</i>
Tout entier, tout le	Restez <i>toute</i> la journée
<b>Tuto</b> ( <i>substantif</i> )	<i>La tuto kontentigos vin</i>
Le tout (la chose dans son entier)	Le <i>tout</i> vous satisfera
<b>Ĉiom</b> ( <i>adverbe</i> )	<i>Li havis multe da mono, sed elspezis ĉiom</i>
Le tout (idée de quantité)	Il avait beaucoup d'argent, mais dépensa le <i>tout</i>
<b>Tute</b> ( <i>adverbe</i> )	<i>Lia vizaĝo estas tute nigra</i>
Totalement, entièrement	Il a le visage <i>tout</i> noir
<b>Kvankam</b> ( <i>adverbe</i> )	<b>Kvankam</b> <i>li estas riĉa</i>
Quoique, bien que	<i>Tout</i> riche qu'il est

*Tout à fait* = **tute**  
*Pas tout à fait* = **ne tute**  
*Pas du tout* = **tute ne**  
*Rien du tout* = **neniom**  
*Tout au plus* = **apenaŭ**  
*En tout* = **sume**

*Tout de suite* = **tuj**  
*Tout à l'heure* = **post momento**  
*Tout à coup* = **subite**  
*Tout le long* = **laŭlonge**  
*Après tout* = **cetere**  
*Tout en causant* = **babilante**

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

**Farmobieno.** — Ejoj : stalo : ĉevalejo, bovejo, ŝafejo, kokejo (birdokorto), birdokaĝego, kolombejo, kuniklejo, laktejo, grenejo, garbejo, remizo (ŝirmejo), sterkejo.

Iloj : plugilo, plugmaŝino, pioĉ(il)o, erpilo, semilo, rul(il)o, falĉilo, falĉomaŝino, rastilo, draŝilo, draŝfrapilo, draŝmaŝino, dorskorbo, branĉotondilo, verŝilo.

KRESKAĴOJ : *Furaĝoj* : trifolio, medikago, hedisaro, fojno. *Cerealoj* (grenherboj) : tritiko, sekalo, hordeo, aveno, maizo, poligono, milio, rizo. *Industriaj kreskaĵoj* : kanabo, lino, kotonarbo, sukerbeto, sukerkano, lupolo. *Nefruktaj arboj* : kverko, abio, pino, acero, cedro, cipreso, akacio, betulo, saliko, poplo, alno, ulmo, tilio, kratago, fago, frakseno, bukso, ilekso, eriko, stipo. *Floroj* : rozo, lilio, levkojo, lekanto, lekantego, lekanteto, dianto, vinko, dalio, irido, siringo, geranio, rezedo, mimozo, konvalo, violo, trikoloreto, cejano, sovaĝa papavo, konvolvulo, miozoto, visko, kardo.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Mieno</b> . . . . .	Mine, air, aspect du visage, tournure, manière d'être.
<b>Mino</b> . . . . .	Mine, carrière (exploitée ou non).
<b>Nobela</b> . . . . .	Noble, membre de la noblesse (caste). <i>Nobelulo</i> , un gentleman.
<b>Nobla</b> . . . . .	Noble, de sentiments élevés. [tilhomme.
<b>Nebulo</b> . . . . .	Brouillard.
<b>Nubo</b> . . . . .	Nuage, nuée (propre et figuré).
<b>Ordo</b> . . . . .	Ordre, disposition matérielle. <i>Malorda</i> , en désordre.
<b>Ordono</b> . . . . .	Ordre, commandement, prescription impérative.
<b>Ordeno</b> . . . . .	Ordre honorifique, décoration.
<b>Palaco</b> . . . . .	Palais, édifice somptueux, résidence princière.
<b>Palato</b> . . . . .	Palais, voûte palatale, partie supérieure interne de la bouche.
<b>Pasi</b> . . . . .	Passer (neutre). Le temps passe = <i>Tempo pasas</i> .
<b>Pasigi</b> . . . . .	Passer (actif). Passer le temps = <i>Pasigi tempon</i> .
<b>Paŝi</b> . . . . .	Faire des pas, marcher quelques pas. <i>Paŝego</i> , une enjambée.
<b>Permesi</b> . . . . .	Permettre (donner la permission).
<b>Ebligi</b> . . . . .	Permettre (rendre possible, réalisable).

## La partoj de la homa korpo

Foje la partoj de la homa korpo decidis, ke ili ne plu helpos unu la alian. La piedoj diris : « Ni ne plu volas porti vin. Havigu mem piedojn al vi, se vi volas iri. » La manoj diris : « Kial ni solaj laborus? Havigu mem manojn al vi, se vi havas laboron por ili. » La buŝo murmuris : « Mi ja estus stulta, se mi ĉiam preparus panon al la stomako, por ke li povu tiun digesti. Li havigu mem buŝon al si, se li volas maĉitan panon. » Ankaŭ la okuloj ne plu volis atenti pri ĉio por la tuta korpo. Same parolis la oreloj kaj ĉiuj aliaj partoj.

Sed kio sekvis? Ĉar la piedoj ne plu iris, la manoj ne laboris, la buŝo ne maĉis, sekve ĉiuj partoj komencis velki. Tiam ili komprenis, kiel ili estis malspritaj, kaj ili rekomencis laboradi. Kaj tiam la korpo ree komencis farti bone, kiel antaŭe.

## PRAKTIKA FRAZARO

## EN RESTORACIO

Ĉe komuna tablo: S-ino A, S-roj B kaj C, vojaĝantoj.

S-ino A. — Kelnero, kiam vi alportos la botelon da minerala akvo, kiun mi mendis?

KELNERO. — Pardonu, Sinjorino, mi ĝin tute forgesis. Tuj mi alportos ĝin.

S-ino A. — Alportu do manĝokarton. Vi ne metis unu ĉe tiu tablekstremaĵo.

KELNERO. — Mi bedaŭras tiun forgeson, Sinjorino. Jen menuo, pardonu.

S-ino A. — Ĉu ni estos fine servitaj hodiaŭ aŭ ne? Al mi urgas, kaj de pli ol kvaronhoro mi atendas la supon.

KELNERO. — La supo alvenos post momenteto; mi petas vin pacienci ankoraŭ unu minuton.

S-ino A. (al la Sinjoroj). — Pacienco estas unu el la plej ŝatindaj virtoj.

S-ro C. — Alportu botelon da akvo.

KELNERO. — Bone, Sinjoro. (Li foriras. Oni ĵus alportis la supon).

S-ro B. — Tiu ĉi supo estas tute sengusta. Kelnero, salon mi petas!

S-ino A. (komplezema). — Jen la salujo, Sinjoro.

S-ro B. — Mi bedaŭras, Sinjorino, ke vi havas la penon, kaj mi dankas pro via afableco.

S-ino A. — Vere ne meritas.

S-ro B. — Ĉu vi bezonas salon, Sinjorino?

S-ino A. — Ne, dankon. Laŭ mia gusto la supo estas sufiĉe spicita.

S-ro B. — Mi ne opinias same. Pri gustoj kaj koloroj, ni ne disputu, ĉu ne vere? Kaj vi, Sinjoro, ĉu vi deziras, ke mi ŝovu al vi la salujon?

S-ro C. — Koran dankon, ne; jam enestas tro da salo. Sed bonvolu doni al mi la raspitan fromaĝon.

S-ro B. — Tre volonte, Sinjoro.

S-ro C. — Mi tre deziras scii pri la hodiaŭa menuo.

S-ino A. — Oni jam forprenis la karton, sed mi memoras pri la enhavo: almanĝaĵoj, salmotruto, rostbefo kun pizoj, kokidaĵo kun salato, glaciaĵo, fromaĝo, fruktoj, kukoj kaj biskvitoj.

S-ro C. — Mi estas al vi danka pro viaj informoj, Sinjorino. Kelnero, vi bonvolu doni al mi dentopurigilon.

S-ro B. — Kaj al mi botelon da glacia akvo; mi trinkas nur akvon tre malvarman.

S-ino A. — Mi tre bedaŭras, ke ne estas ovaĵo.

S-ro C. — Vi sendube ŝatas ovojn, Sinjorino?

S-ino A. — Jes, Sinjoro. Kiam mi estas hejme, mi preskaŭ ĉiutage mangas tiun bonegan nutraĵon.

S-ro B. — La fiŝo estis plej bongusta.

S-ino A. — La saŭco ja estis lerte farita kaj ĝustamezure spicita.

S-ro B. — Mi preferas, kiam ĝi enhavas kaporerojn.

S-ro C. — Kelnero! Kiam vi servos la kafon, vi tre zorgu, ke ĝi estu varmega; mi ne ŝatas kafon malvarman.

KELNERO. — Jes, Sinjoro. En ĝi, kion vi deziras: ĉu rumo, ĉu konjako?

S-ro C. — En ĝi mi deziras nur... sukeron. Nenian alkoholaĵon mi trinkas.

KELNERO. — Bone, Sinjoro.

S-ino A. — Diru, kelnero, ĉu anstataŭ kafo oni ne povus servi al mi tason da teo?

KELNERO. — Mi ne scias, Sinjorino; mi demandos pri tio.

S-ro C. — Kial do vi ne alportis mian botelon da akvo?

KELNERO. — Pardonu, mi forgesis.

S-ro B. — Vi do pasigas vian vivon forgesante! Tamen, vi certe ne forgesos alporti al mi la kalkulon.

KELNERO. — Tuj, Sinjoro.

## CHAPITRE NEUVIÈME

## PRÉPOSITIONS DE, A, PAR, AVEC

En français, les prépositions ont généralement des significations multiples. Chacune de ces significations est rendue, en Esperanto, par une préposition de sens unique et rigoureusement défini.

Voici quelques traductions de ces expressions illogiques :

**de**

La route <i>de</i> Léningrad (direction)	<i>La vojo al Leningrado</i>
L'amour <i>de</i> l'Humanité »	<i>La amo al la Homaro</i>
Préparatif <i>de</i> grève (but)	<i>Preparo por striko</i>
Partir <i>de</i> jour (pendant)	<i>Foriri dum tago (ou foriri tage)</i>
Rougir <i>de</i> honte (à cause de)	<i>Ruĝigi pro honto</i>
L'un <i>de</i> nous (extraction)	<i>Iu el ni</i>
Se souvenir <i>de</i> Jaurès (au sujet de)	<i>Memori pri Jaurès</i>
Un verre <i>de</i> thé (quantité)	<i>Glaso da teo</i>
Montrer <i>de</i> la main (moyen)	<i>Montri per la mano</i>
Le groupe <i>de</i> Berlin (origine)	<i>La grupo de (ou en) Berlino</i>

Explétif (ne se traduit pas — non plus devant un infinitif).

Avoir <i>de</i> belles fleurs, <i>Havi belajn florojn</i>	Quoi <i>de</i> nouveau? <i>Kio nova?</i>
Maladie <i>de</i> la peau, <i>Haŭta malsano</i>	Rien <i>de</i> grave <i>Nenio grava</i>
Il vient <i>de</i> partir, d'écrire, de manger	<i>Li ĵus foriris, skribis, manĝis</i>

**à**

Etre <i>à</i> la campagne (sur)	<i>Esti sur la kamparo</i>
Attendre <i>à</i> la porte (à cet endroit)	<i>Atendi ĉe la pordo</i>
S'asseoir <i>à</i> table »	<i>Sidigi ĉe tablo</i>
Etre <i>à</i> Moscou (dans)	<i>Esti en Moskvo</i>
Etre <i>à</i> la gare (dans)	<i>Esti en la stacidomo</i>
De l'est <i>à</i> l'ouest (jusqu'à)	<i>De oriento ĝis okcidento</i>
Boire <i>à</i> la fontaine (de la)	<i>Trinki el la fontano</i>
Aller <i>à</i> Londres (vers)	<i>Iri al Londono (ou iri Londonon,</i>
A 3 heures	<i>Je la 3-a</i>

**par**

<i>Par</i> la fenêtre (à travers)	<i>Tra la fenestro</i>
Jour <i>par</i> jour (après)	<i>Tago post tago</i>
Brisé <i>par</i> le vent (agent du passif)	<i>Rompita de la vento</i>
Partager <i>par</i> moitié (à raison de)	<i>Dividi po duono</i>
On entend <i>par</i> les oreilles (moyen)	<i>Oni aŭdas per la oreloj</i>

Ne se traduit pas :

Deux <i>par</i> deux = <i>duope</i>	<i>par ci par là = dise</i>
6 <i>par</i> jour = <i>6 ĉiutage</i>	<i>par exemple = ekzemple</i>

**avec**

Venir <i>avec</i> elle (accompagnement)	<i>Veni kun ŝi</i>
Ecrire <i>avec</i> un crayon (moyen)	<i>Skribi per krajono</i>
<i>Avec</i> cela donnez-moi... (en plus de...)	<i>Krom tio donu al mi...</i>
<i>Avec</i> le temps (durée)	<i>Dum la tempodaŭro</i>

Ne se traduit pas :

<i>Avec</i> soin : <i>zorge</i>	<i>Avec</i> habileté : <i>lerte</i>	<i>Avec</i> joie : <i>goje</i>
---------------------------------	-------------------------------------	--------------------------------



## EXERCICES

## VOCABULAIRE

**Sovaĝaj bestoj.** — MAMBESTOJ : leono, leonino, leonido, tigro, tigrino, pantero, hieno, urso, ursino, ursido, leopardo, elefanto, lupo, lupino, lupido, apro, aprino, aprido, vulpo, vulpido, norda cervo, cervo, cervino, cervido, kapreolo, ĉamo, mustelo, putoro, simio.

BIRDOJ : aglo, vulturo, akcipitro, nizo, falko; strigo, noktuo, gufo; fringo, fringelo, najtingalo, sturno, pigo, korvo, hirundo, pasero, silvio, alaŭdo, koturno, perdriko, paruo, ardeo, merlo, turdo, kardelo.

REPTILIOJ : serpento, vipuro, kolubro, aspido, boao (lacerto, krokodilo, testudo).

AMFIBIOJ : bufo, rano, ranido.

FISOJ : *Riverfiŝoj* : ezoko, karpio, truto, perĉo, bramo, tinko, gobio, arĝenta fiŝeto. *Marfiŝoj* : ŝarko, moruo, skombro, salmo, haringo, sardelo, sturgo, tuno, merlango, rajo, soleo, angilo, anĉovo.

KRUSTACOJ : kankro, kankreto, omaro, palinuro, krabo, ostro, mitulo (heliko, limako).

INSEKTOJ : skarabo, majskarabo, formiko, cikado, grilo, muŝo, muŝeto, kulo, moskito, cimo, pulo, pediko, vespo, abelo, papilio, libelo, raŭpo, silka raŭpo, lampiro (luma raŭpo), akrido, lukano, blato, kokcinelo.

## Expressions à ne pas confondre

Pesi .....	(Verbe actif). Peser à la balance, déterminer le poids d'un objet. <i>Pesilo</i> , balance. <i>Pesilego</i> , bascule.
Pezi .....	(Verbe neutre). Peser tant, avoir tel poids. <i>Peziilo</i> , poids marqué servant à peser.
Plado .....	Un plat (vaisselle). <i>Pladeto</i> , soucoupe.
Plato .....	Surface plane (géométrie, architecture, topographie).
Pleto .....	Plateau, pièce plate (orfèvrerie, ébénisterie, etc.)
Plano .....	Plan élaboré, projet avant exécution.
Plataĵo .....	Plateau, terrain élevé et plat. <i>Plata</i> , plat, non bossué.
Polvo .....	Poussière. <i>Polvero</i> , grain de poussière.
Pulvo .....	Poudre à tirer, pour armes à feu, de chasse, de guerre.
Pulvoro .....	Matière pulvérulente, réduite en poudre.
Pudro .....	Poudre de toilette.
Poŝto .....	Poste, service postal, lettres, journaux, etc.
Poŝtofiĉejo .....	Poste (le bureau).
Postaĵo .....	Le derrière d'une chose, la partie postérieure.
Posteno .....	Poste militaire ou de police, emploi, etc.
Premi .....	Presser, comprimer. <i>Premita citrono</i> , un citron pressé.
Presi .....	Passer à la presse d'imprimerie, imprimer.

## Nesolvebla tasko

En amuzejo imitisto de bestovoĉoj asertas al publiko, ke li povas imiti la voĉon de ĉiu ajn besto. Li jam blekis kiel ŝafvo, bojis kiel hundo, miaŭis kiel kato, gruntis kiel porko, kvakis kiel rano, pepis kiel pasero, k. t. p.

Li nun petas, ke la aŭdantoj donu al li pluajn taskojn. Unu momenton ĉio restas silenta. Poste oni aŭdas bonhumoran basvoĉon :

— Nu, krii foje kiel oleosardino.

## RAKONTOJ

### Mortigisto

Viro estas kurinta preter Sokrato dum unu el la promenadoj de la filozofa. Alia viro, kiu postkuris lin, kriante : Arestu ! arestu ! haltis ĉe Sokrato kaj riproĉis :

— Kial vi ne malhelpis lian forkuron ? Li estas krimulo, mortigisto !

— Mortigisto ? Kion vi komprenas per tiu vorto ?

— Ne ŝercu ! Mortigisto estas homo, kiu mortigas.

— Buĉisto ?

— Malspritulo ! Homo kiu mortigas alian homon.

— Ha, jes, soldato.

— Azeno ! Homo mortiganta alian ekster milito.

— Mi komprenas : ekzekutisto.

— Idioto ! Homo kiu mortigas alian hejme.

— Tre bone, kuracisto.

La postkurinto foriris en la konvinko, ke li estas parolinta kun maljuna frenezulo.

### Li ne volas trouzi

Piedvojaĝanta vilaĝano, trenanta grandan sakon da terpomoj sur la dorso, renkontas kaleŝon, sur kiu sidas nur veturigisto, lia konatulo Johano.

— He, Johano, bonan tagon ! Permesu al mi sidiĝi sur vian kaleŝon.

— Bone amiko, sursidiĝu.

La vilaĝano rapide sidiĝas sur la kaleŝon, dum la veturado tenante ankoraŭ la sakon sur sia dorso.

— Kial do vi ne demetas la sakon ? ĝi estas ja grandpeza.

— Mi estas al vi dankaj kaj kontenta pro tio, ke vi bonvole konsentas veturigi min en via kaleŝo ; mi ne volas tro uzi vian bonecon por deziri veturigi ankaŭ miajn terpomojn.

### Nigra sango

Teodoro, venanta el lernejo, havas grandan inkomakulon sur sia kajero. La patro mallaŭdas Teodoron pro tio, sed la knabo, tute ne embarasita, respondas :

— Patro, mi estas senkulpa. Mia kamarado estas negro. Li sin vundis kaj la sango fluis sur mian kajeron. Jen, kial mia kajero estas makulita !

Laŭ Teodoro, do negroj havas nigran sangon.

## RAKONTOJ

### Danĝera vundo

SinJORINO negrave pikis sian fingron. Kun teruro ŝi rapide sendis la servistinon por serĉi kuraciston. Tiu-ĉi alveninte, tre koleris, ke pro tia bagatelo li estas alvokita.

— He! li diris al la servistino, donante al ŝi recepton, rapidu, tre rapidu al apoteko, por alporti tiun ĉi kuracilon.

— Je Dio! diris kun teruro la sinjorino, ĉu la vundo estas tiel danĝera?

— Ne, respondis la kuracisto, sed se ŝi ne tre rapidos, vi resaniĝos antaŭ la alporto de l' kuracilo.

### Kolegoj

LA BANKESTRO. — Tio ĉi estas friponaĵo! Kiel vi riskas penetri en mian ĉambron?

LA MIZERULO. — Ne koleru, sinjoro bankestro, ni ja estas kolegoj.

LA BANKESTRO. — Kolegoj?

LA MIZERULO. — Nu, ĉar mi ambaŭ kolektas kapitalojn. La diferenco estas nur, ke vi kolektas jam la duan milionon, dum mi klopodas ankoraŭ pri la unua.

### Multvaloraj ŝtonoj

Riĉa komercisto montris al muelisto diversajn ringojn kun ŝtonoj kaj certigis, ke ili estas tre multekostaj.

— Mi tion kredas, diris la muelisto, ili bele brilas, sed kian profiton ili donas?

— Ili donas nenian profiton, respondis la komercisto, kontraŭe ili kostas multe da mono.

— Mi preferas du ŝtonojn, diris la muelisto, kiujn mi posedas, ĉar ili kostas nur cent markojn kaj ĉiujare donas al mi pli ol mil da profito.

### Terura eraro

SinJORO ĵus reveninta el sia laborejo, sidiĝas ĉe manĝotablo. Lia edzino alportas la manĝaĵon kuiritan de ŝi mem.

LA EDZO. — Kia fuŝkuiraĵo estas tio ĉi? Ĝia abomena gusto ja naŭzas.

LA EDZINO. — Pardonu, mia kara, mi eraris dum la kuirado, ĉar pretigante la manĝaĵon, en la kuirlibro mi turnis samtempe du paĝojn.

## CHAPITRE DIXIÈME

## EXPRESSIONS DIVERSES

Voici quelques expressions courantes :

Asseyez-vous, je vous prie	<i>Sidiĝu, mi petas</i>
Est-ce que je ne vous dérange pas ?	<i>Ĉu mi ne ĝenas vin ?</i>
Je serai très heureux de vous revoir	<i>Mi tre ĝojos, se mi revidos vin</i>
Votre montre avance de 10 minutes	<i>Via poŝhorloĝo rapidas 10 minutojn</i>
Votre montre retarde d'une demi-heure	<i>Via poŝhorloĝo malrapidas duonhoron</i>
8 heures viennent de sonner	<i>La oka ĵus sonoris</i>
Il est plus de 14 heures	<i>Pasis jam la dek kvara</i>
Quel temps fait-il aujourd'hui ?	<i>Kia estas la vetero hodiaŭ ?</i>
Quelle diable d'idée avez-vous !	<i>Kian strangan ideon vi havas !</i>
Quel âge avez-vous ?	<i>Kiomjara vi estas ? (ou : kiomaĝa)</i>

## Expressions brèves

En un mot	<i>Unuvorte</i>	Il faut que	<i>Estas necese, ke</i>
A mon sens	} <i>Laŭ mia opinio</i>	D'autre part	<i>Aliparte</i>
A mon idée		De mon côté	} <i>Miaflanke</i>
Selon moi	} <i>Miaopinie</i>	Quant à moi	
D'après moi		De tout cœur	<i>Tutkore</i>
C'est vrai	<i>Estas vere</i>	A demain	<i>Ĝis morgaŭ</i>
Ce n'est pas vrai	} <i>Estas nevere</i>	A après-demain	<i>Ĝis postmorgaŭ</i>
C'est faux		A dimanche	<i>Ĝis dimanĉo</i>
C'est possible	<i>Estas eble</i>	A bientôt	<i>Ĝis baldaŭ</i>
C'est impossible	<i>Estas neeble</i>	Au revoir	<i>Ĝis revido</i>
C'est douteux	<i>Estas dube</i>	D'abord	} <i>Unue</i>
Dans un moment	<i>Post momento</i>	Premièrement	
Depuis un moment	<i>De momento</i>	Ce n'est rien	<i>Estas nenio</i>
Il y a un moment	<i>Antaŭ momento</i>	C'est grave	<i>Estas grave</i>
		Tranquillisez-vous	<i>Trankviliĝu</i>

## LE MOT GRAND

Il faut bien se garder de toujours traduire le mot *grand(e)* par *granda*. Ex.

La Russie est un <i>grand</i> pays (superficie)	<i>Rusio estas granda lando</i>
Napoléon I <sup>er</sup> fut un <i>grand</i> assassin (fameux, célèbre)	<i>Napoleono 1-a estis fama krimulo</i>
Les hommes du Nord sont <i>grands</i> (de taille)	<i>La nordaj homoj estas altkreskaj</i>
C'était une <i>grande</i> fête (importante)	<i>Ĝi estis grava festo</i>

Ne se traduit pas :

Faire un <i>grand</i> discours	<i>Longe paroladi</i>
Réussir avec <i>grande</i> difficulté	<i>Malfacile sukcesi</i>
Avoir un <i>grand</i> chagrin	<i>Ĉagrenegi</i>

**Retour sur l'accusatif.** — En dehors du cas où le verbe *esti* sert pour marquer le prix, la mesure, la distance, le degré (Ex. : *Li estas jaron pli aĝa ol mi, il a un an de plus que moi*), l'on ne met **jamais** l'accusatif après ce verbe. De cela résulte une pratique qui semble se généraliser, suivant laquelle l'on n'ajoute pas l'accusatif à un *participe actif* (-inta, -anta, -onta) suivi d'un complément direct (c.-à-d. d'un second accusatif), pour la clarté de la phrase. La pensée sous-entend alors : **kiu estas**, c.-à-d. une nouvelle proposition.

Ex. : *Ili starigas socion (kiu estas) feliĉigonta la homaron.*

*Mi ricevis leteron (kiu estas) enhavanta fotografiaĵon.*

Ceci n'est pas une règle, mais une tolérance que la logique permet.

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

**Oficejo.** — Aĵoj : skribotablo, tirkesto, fako, fakaro, libroŝranko, paperŝranko, monŝranko, brakseĝo, mapo (geografia karto), tabeloj, laborplano, kalendaro, paperkorbo, horloĝo.

**ILOJ** : plumo, plumujo, plumingo, kraĵono, skrapgumo, inkujo, skrapilo, liniilo, papertranĉilo, tondilo, pinglo, fiksilo, sigelilo, sigelvakso, stampilo, sorba papero, inksorbilo, glupoto, banderolo, cirkelujo, ortilo, vortaro, adresaro, jarlibro, registro, kalkulilo, sliparo, etiketo, skribmaŝino, paperpremilo, leterpapero, koverta, notlibreto, malneta kajero, repertuaro, leterreproduktilo.

**Istoj** : oficejestro, oficisto, skribisto, kontregistristo, kasisto, komisiisto, telefonisto, stenografisto, telefonistino, maŝinskribistino, sekretario, helpsekretario, tradukisto.

## Expressions à ne pas confondre

Prezo . . . . .	Prix, coût d'un objet.
Premio . . . . .	Prix obtenu à titre de récompense.
Protekti . . . . .	Protéger (une personne, une nation) (sens moral).
Ŝirmi . . . . .	Abriter, couvrir, protéger, garantir (sens physique).
Provi . . . . .	Essayer, éprouver, soumettre à un essai.
Pruvi . . . . .	Prouver, faire la preuve, démontrer.
Regi . . . . .	Gouverner, avoir la haute direction.
Reĝi . . . . .	Régner, exercer le pouvoir souverain, être roi.
Reprezenti . . . . .	Représenter (art, gravure, théâtre. (Le plus souvent <i>prezenti</i> suffit.)
Riprezenti . . . . .	Représenter (commerce, diplomatie). <i>Riprezentanto</i> , un représentant.
Revi . . . . .	Rêver tout éveillé.
Sonĝi . . . . .	Rêver en dormant, avoir un rêve, un songe.
Roso . . . . .	Rosée, condensation de vapeur d'eau.
Rozo . . . . .	Rose (fleur). <i>Rozkolora</i> , couleur rose.
Ŝargi . . . . .	Charger une arme à feu.
Ŝarĝi . . . . .	Charger un fardeau sur....
Senco . . . . .	Sens d'un mot, d'un texte, signification à lui attribuer.
Sento . . . . .	Sens, faculté, sentiment.
Ŝerci . . . . .	Plaisanter.
Serĉi . . . . .	Chercher.

## Distreco

Tre distriĝema homo estis iam invitata de sia amiko por kartludo. La edzino, bone konanta la forgesemon de sia edzo, diris al li :

— Memoru, mia kara : Salutu je mia nomo la mastrinon ! Donu trinkmonon al la servistino ! kaj venu hejmen kun via ombrela !

La sinjoro tuj skribis ĉion en sian notlibreton, por ke li nenion forgesu. Sed dum la vojo li ĉion konfuzis kaj poste salutis la ombrelon, donis trinkmonon al la mastrino kaj revenis hejmen kun la servistino.

## LETEROJ (Lettres)

Paris, la 15-an de Aŭgusto 1921.

Al Kamarado A. MIRTOV, en Petrogrado.

Kara Kamarado,

Leginte en *Sennaciulo*, ke vi deziras korespondi kun francaj kamaradoj, kaj ĉar miaflanke, mi estus tre kontenta rilati kun Rusoj, mi petas vin bonvoli konsenti interŝanĝi leterojn kun mi.

Jam de kelkaj jaroj, ni ĉi tie ricevas nenian privatan novaĵon el Rusio: nur oficialaĵojn ni legas en ĵurnaloj. Vi tre bone scias, ke en kapitalisma socio « oficialaĵo » signifas: *neveraĵo*. Tial pri tio okazinta kaj okazanta en via lando, ni estas misinformitaj. Estus do por mi netaksebla plezuro ricevi sciigojn el tute fidinda korespondanto.

En Francujo — sendube dank' al la *Venkego* — regas tia reakcio, kian ni neniam konstatis, de kiam estas Respubliko. Antaŭ kelkaj jarcentoj, kiu ne pensis kiel la tiamaj regantoj, tiu estis nepre mortigita. La nuntempaj regantoj — demokratoj! — ne plu mortigas siajn kontraŭulojn: ili nur malliberigas ilin. Progreso, ĉu ne? Aliflanke, la ekonomia stato estas tiel malnormala, ke niaj « kompetentaj » ŝtataadministrantoj estas tute nekapablaj ĝin renormaligi. Ŝtata bankroto ŝajnas neevitebla: tiam estos la... fina batalo!

Ĉar mi ne estas absolute certa, ĉu tiu mia unua letero vin trafos, mi hodiaŭ ne skribas plu.

Kun espero, ke mi kiel eble plej baldaŭ ricevos novaĵojn de vi, mi frate vin salutas.

B. ARISTIDE, Paris.

Petrogrado, la 1-an de Septembro 1921.

Al Kamarado B. ARISTIDE, en Paris.

Kara franca Kamarado!

Kun neesprimebla ĝojo mi ricevis vian fratan leteron. Iam, efektive, ekzemplero de *Sennaciulo* tute hazarde troviĝis en miaj manoj. Tiam, nesciante, ĉu mia letero trafos ĝian redakcejon, mi sendis al tiu gazeto la alvokon, kiun vi legis kaj dank'al kiu mi fine ricevas novaĵojn el Francujo. Ĝojege!

Kamarado mia! Inter vi kaj mi ne plu ekzistas baroj! Ni dank'al la internacia lingvo povas senpere rilati, interkompreniĝi. Miraklo el la mirakloj!...

Jes, Kamarado mia, mi plezurege konsentas vin informi pri ĉio okazinta kaj ankoraŭ nune okazanta en Rusio. Sed kiom multe mi havas por diri, kiom multe!

Mi antaŭ ĉio diru al vi, ke ne estas mirinde, se via fiburĝaro trompas vin pri la okazintaĵoj en mia lando. Ĉu vi ja scias, kara K-do, ke en Rusio kapitalismo estas neniigita? Jes, K-do mia, jes, la monstro kapitalismo disfalis morte frapita de la supermal-feliĉa rusa proletariaro! Same burĝaro ankaŭ ne plu ekzistas, ĉar nia devizo estas: *Kiu volas manĝi, tiu devas labori*. (Vi konscias pri tio, ke ĉiuj volas manĝi).

Tamen ne kredu, Kamarado, ke subite nia lando fariĝis paradizo. Ho, ve!... Se ni jam faris multe, de kiam ni neniigis la ĝis-

nunan socian ordon, restas ankoraŭ pli multe por realigi. Socia reordigo laŭ komunisma idealo postulas ankoraŭ multe da jaroj. Dume ni estos malfeliĉaj laŭ materiala vidpunkto sed — kreu ĝin — feliĉegaj laŭ morala.

Per ilia « blokado » viaj burĝoj ankoraŭ militas kontraŭ ni. Tio montras, ke ili timegas, ke ni starigu neŝanceligeblan komunistan socion: kion ajn faros tiuj fihomoj, ni ĝin nepre starigos!

Mi ĉesigas mian babiladon, sed alian fojon, mi skribos pli longe. Finante mi vin petas bonvoli sciigi pri tio, okazanta en via lando kaj sendi al mi kelkajn esperanto-gazetojn.

Kun korfrata saluto mi restas via

A. MIRTOV, en Petrogrado.

Yokohama (Japanio), 21-an de Junio 1921.

Al Kamaradino Margareto VESMAY,  
en Lyon — Francio.

Tre kara Kamaradino,

Vi ne povas imagi, kian ĝojegon naskis en mi la legado de via ĵus ricevita letero! Novaĵojn el Eŭropo mi ricevis!...

Kiam mi skribis al vi, petante, ke vi bonvolu korespondi kun mi, mi demandis min, ĉu vi bone komprenos mian leteron. Mi plej plezure konstatas jes — ĉar vi tre klare respondis miajn demandojn. Ĉu vi scias, amikino mia, ke nur de 10 monatoj mi lernas la internacian lingvon? Por ni, Azianoj, la lernado de eŭropa lingvo (angla, germana, franca, k. t. p.) postulas 4-5 jarojn, dum kontraŭe Esp-on oni povas tutlerni en proksimume 1 jaro. (Ni ja estas devigataj lerni ne nur ĉiujn radikvortojn, sed eĉ alfabeton! Tamen dank'al ĝia senescepta gramatikregularo kaj logikeco, Esp-o estas por ni la lingvo plej facillernebla).

Mi tre dankas vin pro viaj sciigoj rilate nunan vivadon en via lando. Miaj samfamilianoj kaj mi mem tre miris, eksciante, ke la vivo estas nune tiel malfacila kaj kosta en Francio — lando de la Venko!

Skribante pri la virina demando, vi plendas, ke en Francio la virinoj ne estas samrajtaj kun la viroj. Tiel longe, kiam sur la tuta Terglobo la virina rajto diferencos la viran, ni certe estos pravigitaj laŭte, laŭtege protesti kontraŭ tiu diferenco sed, kompatindulineto mia, se vi estus plene informita pri la sorto de japana virino, — kvankam Japanio estas konsiderata kiel civilizita lando, — vi konstatus, ke sur la rajtoskalo, la eŭropaj virinoj staras multe pli alte ol ni, kompatindulinoj. Proksiman fojon, kiam mi skribos al vi, mi komencos trakti tiun por ni gravegan temon. (Mi diras, ke mi komencos, ĉar ĝi necesigos multe da leteroj, ho ve!)

Samtempe kun tiu ĉi letero, mi sendas al vi ventumilon, kies ornamano desegnaĵon mi verkis mem. Mi ĝojos, se ĝi plaĉos al vi.

Mi estus al vi tre danka, se vi bonvolus sendi al mi vian portreton: mi sendos la mian poste. Vi sciigu min pri laboristara movado en Francio: tio tre interesas min.

Frato mia, kiu estas anarkiisto, lernas Esp-on por, ke li povu rilati kun alilandaj, precipe eŭropaj, kamaradoj.

Kun espero, ke mi tre baldaŭ ricevos leteron de vi, mi petas vin bonakcepti mian tutkoran saluton.

MAZESANE MAZEMOTO (Yokohama).

## CHAPITRE ONZIÈME

## PAYS ET PEUPLES

Pour nommer les **pays** et les **peuples**, en Esperanto, comme dans toutes les langues nationales, on emploie **deux systèmes** :

1° *Du nom de pays on dérive le nom du peuple qui l'habite, à l'aide du suffixe **ano**.*

C'est ainsi pour tous les noms de *continents*, de *provinces*, de *villes* :

<b>Afriko</b> , <i>Afrique</i>	<b>Galicio</b> , <i>Galicie</i>	<b>Parizo</b> , <i>Paris</i>
<b>Afrikano</b> , <i>Africain</i>	<b>Galiciano</b> , <i>Galicien</i>	<b>Parizano</b> , <i>Parisien</i>

De même pour tous les noms de *pays* dont le *peuple* n'a pas une *langue propre*, une *longue vie historique*, comme la plupart des pays d'*Afrique*, d'*Amérique* et d'*Océanie*. Le *pays* (radical) donne son nom au *peuple* (dérivé) qui l'habite :

<b>Maroko</b> , <i>Maroc</i>	<b>Kanado</b> , <i>Canada</i>	<b>Aŭstralio</b> , <i>Australie</i>
<b>Marokano</b> , <i>Marocain</i>	<b>Kanadano</b> , <i>Canadien</i>	<b>Aŭstraliano</b> , <i>Australien</i>

2° *Du nom de peuple on dérive le nom du pays habité, à l'aide de **ujo**, de **lando**, ou de **io**.*

C'est ainsi pour la plupart des pays d'*Europe* et d'*Asie*, qui ont une *langue propre*, une *longue vie historique*. Le *peuple* (radical) donne son nom au *pays* (dérivé) qu'il a organisé :

<b>Germano</b> , <i>Allemand</i>	<b>Polo</b> , <i>Polonais</i>	<b>Arabo</b> , <i>Arabe</i>
<b>Germanujo</b> , <i>Allemagne</i>	<b>Pollando</b> , <i>Pologne</i>	<b>Arabio</b> , <i>Arabie</i>

Alors que dans les langues nationales, aucune loi ne régit cette double dérivation, l'Esperanto considère *systématiquement* l'idée de *peuple d'origine* ou de *pays d'origine*.

## Ujo — Lando — Io

Ces trois formes, *également employées* en Esperanto, sont *également bonnes*.

1° **Ujo** signifie *réceptif* (ce qui enferme). Il convient, à la rigueur, pour désigner les pays (enfermés par leurs frontières). Dans le *Fundamento*, Zamenhof écrit :

**La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo.**

Il semble devenir un *archaïsme* que remplacera peut-être le *néologisme io*. **Ujo** est à employer de préférence avec des radicaux de *plusieurs syllabes* ou quand la forme en **io** n'est pas internationale :

<b>Portugalujo</b> , <i>Portugal</i>	<b>Japanujo</b> , <i>Japon</i>
--------------------------------------	--------------------------------

2° **Lando** signifie *pays*. Il permet la forme *composée* logique (**Ruslando** = *pays russe, Russie*), très utile pour éviter la répétition de **ujo** ou de **io** dans une liste de noms de pays, très *harmonieuse* avec les radicaux d'une *seule syllabe* (**Greklando**), plus lourde et à éviter avec les radicaux de plusieurs syllabes (**Portugallando**) ou quand l'euphonie ne le permet pas (**Franclando** : à cause de *cl = tsl*).

<b>Skotlando</b> , <i>Ecosse</i>	<b>Danlando</b> , <i>Danemark</i>	<b>Svislando</b> , <i>Suisse</i> <sup>(1)</sup>
----------------------------------	-----------------------------------	---

3° **Io** est un suffixe néologisme non encore officiel. C'est la finale très internationale des noms de pays à employer de préférence lorsque le nouveau mot (**Ital-io**) peut être considéré comme un radical international (**Itali-o**) permis par la règle 15 du *Fundamento*.

**Germanio**, **Bulgario**, **Rumanio**, **Ĉekoslovakio**, **Mongolio**.

(1) En abrégé : *Skotl.*, *Danl.*, *Svisl.*



## EXERCICES

## VOCABULAIRE

**Poŝtoŝejoj.** — Istoj : poŝtisto, poŝtestro, leteristo (leterportisto), telegrafisto, depeŝportisto, telefonisto, poŝtoŝicistino, kuriero, elektrikisto.

Aĵoj : letero, koverto, leterpapero, banderolo, poŝtmarko (kvincentima, dekcentima, dudekkvincentima), poŝtkarto, afranko, poŝtpakaĵo, leterkarto, rekomendita letero (aŭ enskribita, enregistrita), stampo, depeŝo, telegramo, kablodepeŝo, poŝtmandato, internacia respondkupono, poŝtmandata sendatesto, ricevatesto, telegrafofosto, leterkesto (aŭ poŝtkesto, aŭ leterujo), telegraŝadeno, pilo, telefon-ejo (telefonĉelo).

ILOJ : telegrafo, telefono, parolilo, aŭdilo, pesilo kaj peziloj, leterpesilo, stampilo, sigelilo.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Servi</b> .....	Servir, remplir un emploi, rendre un service.
<b>Taŭgi</b> .....	Servir, être bon pour, propre à, convenir à tel
<b>Utili</b> .....	Servir à, être utile à, pour... [usage.
<b>Uzi</b> .....	Se servir de, faire usage de, employer.
<b>Deĵori</b> .....	Etre de service.
<b>Soni</b> .....	Sonner, résonner, rendre des sons.
<b>Sonori</b> .....	Tinter, rendre des vibrations sonores prolongées. <i>Sonorilo</i> , cloche.
<b>Sperto</b> .....	Expérience de la vie, connaissance acquise par la
<b>Eksperimento</b> .	Expérience scientifique.  pratique.
<b>Stato</b> .....	Etat, manière d'être (bonne ou mauvaise) d'un individu, objet, etc.
<b>Ŝtato</b> .....	Etat (gouvernement politique).
<b>Regno</b> .....	Un Etat, une puissance. <i>Samregnanoj</i> , citoyens d'un même pays.
<b>Etato</b> .....	Document, état, pièce comptable.
<b>Ŝuti</b> .....	Verser, répandre, renverser des matières non liquides.
<b>Verŝi</b> .....	Verser, faire couler un liquide, arroser.
<b>Tabelo</b> .....	Table, liste, énumération alphabétique.
<b>Tablo</b> .....	Table, meublé à écrire, à manger, etc.
<b>Tabulo</b> .....	Tableau, planche. <i>Nigra tabulo</i> , tableau noir. <i>Ŝaka tabulo</i> , échiquier.

## La maljuna kokino

Sinjoro en restoracio ekmanĝas kokinaĵon, kiun li trovas tre malmola.

— He, kelnero, li diras moktone, kian aĝon havis tiu ĉi kokino?

— Sinjoro, respondas la kelnero rigide, la kokinaĵon ni servas kun laktokrema saŭco, kaj ne kun biografiaĵoj.

## POUR BIEN TRADUIRE

## Modèles de traduction

*Pour bien savoir une langue, il faut penser directement dans cette langue et exprimer sa pensée le plus simplement, le plus naturellement.* —

*Pour bien traduire, rappelons-nous toujours qu'il faut traduire non les mots mais leur sens.* —

Au fur et à mesure que se propagera et se pratiquera la langue internationale, les frontières entre les peuples fondront comme beurre au soleil. Ce ne sera qu'à ce moment que l'union du prolétariat mondial sera vraiment possible. —

Tant que l'instruction ne sera pas obligatoire et gratuite à tous les degrés, le peuple aura le droit de dire qu'on lui vole le plus précieux de ses biens. —

La vérité n'est révolutionnaire qu'à cause du désordre de l'erreur : la Révolution, c'est l'Ordre ! (H. Barbusse.)

## CAPITALISME

1) Exploitation des richesses naturelles et organisation du travail au profit d'une minorité d'individus — capitalistes — qui vivent grasement sans rien faire d'utile.

2) La guerre entre les nations dans le seul but d'affermir ou d'augmenter les privilèges des capitalistes.

SOCIALISME  
COMMUNISME

1) La mise en commun de toutes les richesses naturelles.

2) Organisation du travail au bénéfice de tous.

3) L'obligation pour tout individu valide de fournir un travail utile.

4) La fin des guerres par l'établissement de la paix définitive entre tous les peuples.

## ANARCHISME

Refusons-nous à nous laisser diriger par les conducteurs de foules. (H. Ibsen.)

Ce n'est point dans le choix de nouveaux maîtres qu'est le salut. (Elisée Reclus.)

Les anarchistes veulent instaurer un milieu social qui assure à chaque individu le maximum de bien-être et de liberté adéquat à chaque époque. (Le Libéraire.)

Le rôle des anarchistes est de faire évoluer l'individu en révolutionnant le milieu.

## Tradukmodeloj

*Por funde scipovi lingvon, oni devas rekte pensi laŭ tiu lingvo kaj esprimi sian penson kiel eble plej simple kaj nature.* —

*Por korekte traduki, ni ĉiam memoru, ke ni devas traduki ne la vortojn, sed ilian sencon.* —

Laŭmezure, kiam la internacia lingvo disvastiĝos kaj estos praktikata, la interpopolaj baroj malaperos, kvazaŭ varmigata butero. Nur tiam estos vere ebla la unuiĝo de tutmonda proletariaro. —

Tiel longe, kiam la instruado je ĉiuj gradoj ne estos por ĉiuj deviga kaj senpaga, la popolo rajtos plendi pro tio, ke oni fiŝtelas ĝian plej altvaloran bonaĵon. —

La vero estas revoluciiga nur pro la malordo de la eraro : Revolucio, ĝi estas Ordo ! (H. Barbusse.)

## KAPITALISMO

1) Eksploatado de la naturaj riĉaĵoj kaj organizado de la laboro, je la profito de malmulto da fihomoj — kapitalistoj — lukse vivantaj farante nenion utilan.

2) Milito inter la nacioj kun nura celo plifirmigi aŭ plimultiigi la privilegiojn de la kapitalistaro.

SOCIALISMO  
KOMUNISMO

1) Komunigo de ĉiaj naturaj riĉaĵoj.

2) Organizado de la laboro je ĉies profito.

3) Devigo por ĉiu bonfartulo utile labori.

4) Ĉesigo de ĉia milito dank' al starigo de definitiva paco inter ĉiuj popoloj.

## ANARKISMO

Ni rifuzu, ke gvidantoj de amaso konduku nin. (H. Ibsen.)

Ne en elekto de novaj mastroj kuŝas la savo. (Elisée Reclus.)

La anarkistoj deziras nove starigi socian medion kiu donos al ĉiu individuo la maksimumon de komforteco kaj libereco adekvatan al ĉiu epoko. (Le Libéraire.)

La rolo de la anarkistoj estas : evoluigi la individuon per revoluciigo de la medio.

## Modèles de traduction

ARTICLE PREMIER  
DE LA DÉCLARATION DES DROITS  
DE L'HOMME ET DU CITOYEN

Les hommes naissent libres et égaux en droits. Les distinctions sociales ne peuvent être fondées que sur l'utilité commune.

## ARTICLE 35

Quand le gouvernement viole les droits du peuple, l'insurrection est pour le peuple le plus sacré des droits et le plus indispensable des devoirs.

L'idée de patrie est comme un bandeau placé sur les yeux des prolétaires pour les empêcher de voir la réalité. Jusqu'ici, cela a permis aux possédants de tromper ces aveugles qui, croyant défendre la patrie, ne font qu'affermir les privilèges de leurs maîtres.

Après tout les anarchistes ont raison : les pauvres n'ont pas de patrie !

(G. Clémenceau.)

Nous ne connaissons qu'une patrie : la Terre et qu'une famille : l'Humanité.

Affranchissons-nous du préjugé des « savants », et soyons bien persuadés qu'un astronome, un statisticien, un métaphysicien, un philologue — et bien d'autres — sont moins utiles à la société qu'un balayeur de rue.

Si les ouvriers cessaient unanimement le travail, la société s'anéantirait, même si tous les « savants » du monde « travaillaient » cent mille fois plus.

L'humanité n'est pas divisée en manuels et intellectuels : elle ne comprend que des hommes.

Inscription relevée sur la tombe d'un ancien prêtre, à Noyers (Loiret) France

## Egalité

Ici repose le citoyen  
Eugène Courson  
curé de Noyers  
décédé le 17 Décembre 1905  
âgé de 81 ans.

Il avait exprimé à son neveu le désir d'être enterré civilement ne voulant pas que son cercueil fut profané par les simagrées de ses anciens confrères.

## Tradukmodeloj

ARTIKOLO UNUA  
DE LA DEKLARO PRI RAJTOJ  
DE LA HOMO KAJ DE LA CIVITANO

La homoj naskiĝas liberaj kaj laŭ rajtoj egalaj. Sociaj distingo povas esti nur tiam, kiam tion postulas ĉies profito.

## ARTIKOLO 35-a

Kiam la registaro atencas la rajtojn de la popolo, tiam ribelo estas por la popolo rajto plej sankta kaj devo plej necesega.

La sento pri patrolando estas kva-zaŭ blindigilo almetita sur la okuloj de la proletarioj por malebligi, ke ili vidu la realecon. Ĝis nun, tio ebligis, ke la potenculoj trompis tiujn blindulojn, kiuj kredas, ke ili defendas la patrolandon, dum ili nur plifirmigas la privilegiojn de siaj fimastroj.

Cetere la anarkiistoj prave diras : la neposedantoj ne havas patrolandon !

(G. Clémenceau.)

Ni konscias pri nur unu patrolando : Tero, kaj pri nur unu familio : Homaro.

Ni liberiĝu je la antaŭjuĝo pri « scienculoj », kaj ni estu tre konvinkitaj pri tio, ke astronomiisto, statistikisto, metafizikisto, filologo — kaj multe da aliaj — utilas malpli la socion ol stratbalaisto.

Se ĉiuj laboristoj ĉesus labori, la socio disfalus, eĉ se ĉiuj « scienculoj » en la mondo « laborus » centmilfoje pli.

La homaro ne konsistas el manlaboruloj kaj intelektuloj : ĝi enhavas nur homojn.

Surskribaĵo legebla sur pastra tombo en Noyers (Loiret) Francio

## Egaleco

Ĉi tie ripozas la civitano  
Eŭgeno Courson  
pastro en Noyers  
mortinta la 17-an de Decembro 1905.  
Li estis 81 jara.

Li estis espriminta al sia nevo la deziron esti enterigata nereligie ĉar li ne volis, ke lia ĉerko estu profanita per la afektaj hipokritaĵoj de liaj ekskolegoj.

## CHAPITRE DOUZIÈME

## RETOUR SUR LES IDIOTISMES

L'on ne saurait trop recommander aux débutants de bien faire attention au sens des mots qu'ils ont à traduire. Cela pour deux raisons. D'abord, ils seront mieux compris des espérantistes; ensuite, ils n'introduiront pas dans la langue internationale les illogismes dont la nôtre est pleine.

Ainsi, **prendre** se traduira — entre autres :

<i>Prendre</i> le manche	<b>Preni</b> la tenilon	<i>Prendre</i> un repas	<b>Manĝi</b>
<i>Prendre</i> froid	<b>Malvarmumi</b>	<i>Prendre</i> à crédit	<b>Aĉeti</b> kredite
<i>Prendre</i> un lièvre	<b>Kapti</b> leporon	<i>Prendre</i> avec soi	<b>Kunporti</b>
<i>Prendre</i> l'autobus	<b>Uzi</b> aŭtobuson	<i>Prendre</i> peur	<b>Ektimi</b>
<i>Prendre</i> le café	<b>Trinki</b> kafon	<i>Prendre</i> cher	<b>Pagigi</b> kare
<i>Prendre</i> son temps	<b>Ne</b> rapidi	<i>Prendre</i> femme	<b>Edziĝi</b>
<i>Prendre</i> la mer	<b>Enŝipiĝi</b>	<i>Prendre</i> du repos	<b>Ripozi</b>
<i>Prendre</i> en grippe	<b>Ne senti</b> simpation al...	<i>Prendre</i> la parole	<b>Ekparoli</b> <b>Siavice</b> paroli

**Certain** se traduit de deux manières :

Il y a un <i>certain</i> danger	<b>Estas ia danĝero</b>
Il est <i>certain</i> du succès	<b>Li estas certa pri la sukceso</b>

Il faut traduire :

Un exemple à suivre	( <i>imiter</i> )	<b>Ekzemplo imitinda</b>
Voyez-vous l'erreur?	( <i>constater</i> )	<b>Ĉu vi konstatas la eraron?</b>
Ayant regardé la chose	( <i>considérer</i> )	<b>Konsiderinte la aferon...</b>
Naturellement, qu'il viendra!	( <i>cela se comprend</i> )	<b>Komprenoble, ke li venos!</b>
J'accepte votre idée	( <i>approuver, consentir</i> )	<b>Mi aprobas vian ideon</b>
Je recevrai votre ami	( <i>accueillir, accepter</i> )	<b>Mi konsentas pri via ideo</b>
Il a reçu ma lettre		<b>Mi akceptos vian amikon</b>
Avoir beaucoup d'argent	( <i>quantité</i> )	<b>Li ricevis mian leteron</b>
Avoir beaucoup de chagrin	( <i>degré</i> )	<b>Havi multe da mono</b>
La réunion s'est tenue	( <i>a eu lieu</i> )	<b>Esti tre ĉagrena</b>
Il écrit en bon Esperanto	( <i>correctement</i> )	<b>La kunveno okazis...</b>
		<b>Li korekte skribas en Esperanto</b>

## Jeux de Mots (Vortludoj)

Tout comme une langue nationale, l'Esperanto se prête admirablement aux jeux d'esprit :

DEMANDO. — Kiam vespo pikas vin sendolore, kion vi devas respondi?

RESPONDO. — Bonan vesperon!

Klarigo. — Tial, ke *ero* de la vespo, t. e. la pikilo, restis en la ŝvelinta mano.

D. — Kial ĝirafo neniam estas sola?

R. — Ĉar ĝi havas kolegon (kol-egon).

D. — Kial oni devas malhelpi, ke kato kantu?

R. — Ĉar certe okazus katastrofo (kata-strofo) <sup>(1)</sup>.

(1) El « Verda Kato ».

## EXERCICES

## VOCABULAIRE

**Stacidomo.** — Istoj : staciestro, kontrolisto, fervojisto, vagon-arestro, maŝinisto, hejtisto, relŝanĝisto, haltigilisto (frenisto), pakportisto, limimpostisto, librovendistino, doganisto, fervoja gardisto.

**Aĵoj :** kasfenestro (giĉeto), bileto (unuaklasa, duaklasa, triaklasa bileto), ira bileto, irreira bileto, pakajbileto, horarlibro, horartabulo, mapo (geografia karto).

**Ejoj :** pakajdeponejo, atendsalono (atendejo), fervojo, tunelo, viadukto, fervoja trapasejo, doganejo.

**Iloj :** lokomotivo, tendro, restoracivagono, litvagono, kupeo, komercvagonaro, rapidvagonaro, pakvagono, alarma sonorilo, piedvarmigilo, piedbreto, reto, rulkurteno, relŝanĝilo, haltigilo (frenilo), disko, semaforo, fajfilo, pesilego.

## Expressions à ne pas confondre

<b>Tempo</b> .....	Temps qui passe, durée.
<b>Vetero</b> ....	Temps qu'il fait, état de l'atmosphère.
<b>Tiri</b> .....	Tirer quelque chose à soi.
<b>Pafi</b> .....	Tirer (arme à feu).
<b>Trovi</b> .....	Trouver, faire une trouvaille.
<b>Juĝi</b> .....	Trouver, juger, estimer que...
<b>Opinii</b> ....	Trouver (opinion), <b>penser</b> que...
<b>Pensi</b> .....	Avoir une pensée, <b>penser</b> à...
<b>Tuŝi</b> .....	Toucher (être en contact avec).
<b>Trafi</b> .....	Toucher (atteindre un but).
<b>Monricevi</b> .	Toucher de l'argent (en recevoir).
